

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Numero 15

Decembro 1937

Eldonanto :
Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth
(Herts.), Anglujo.

Redaktoro : Teo JUNG
223. Harstenhoekweg
Scheveningen
Nederlando.

30a Universala Kongreso de Esperanto

Londono, 30 Julio — 6 Aŭgusto 1938.

Nombro de Kongresanoj superas jam 320.



Generala vidaĵo sur « Piccadilly Circus », trafikplena parto de Londono.

Kiel raportite en la Informiloj de IEL, la Kongresa Komitato jam dum kvar monatoj vigle laboris, kun la rezulto, ke eĉ je tiu ĉi frua dato multaj aranĝoj estas jam fiksitaj. Tre ĝojiga estas la fakto, ke ĝis nun la Komitato ĉie ricevas simpatian aprobon kaj volontan helpon, pruvo ke la aŭtoritatoj en la brita ĉefurbo tre estimas nian lingvon.

Jam de la komenco, la Komitato rekonis sian devon, kiel eble plej faciligi la restadon de la kongresanoj en la urbeĝo. Ĝi promesis al si, ke laŭ ĝia eblo post la Londona Kongreso neniu ĉeestinto prave povos fari la kutimajn plendojn, ke tio aŭ tio ĉi estis malbone aranĝita. Tiun devon ĝi metas antaŭ ĉiujn aliajn, kaj do oni rajtas esperi, ke la

sukceso de la Londona Kongreso estas jam certigita.

Unu el la unuaj sukcesoj estis la havigo de *University College* kiel la KONGRESEJO. Pro la multaj prelegaj ĉambroj kaj aliaj tre utilaj trajtoj, tiu ampleksa konstruaĵo estos ideala kongresejo. Ĝi situas meze de la hotela kaj pensiona kvartalo, proksime de Oxford Street kaj la aliaj ĉefstratoj, kaj je du-tri minutoj de du stacioj de la subtera fervojo. Ĝi do estas en tute oportuna loko.

Precipe helpema estas la *London Passenger Transport Board* (tiun imponan nomon oni mallongigas al « London Transport »), la potenca aŭtoritato kiu direktas ĉiujn transportrimedojn — es-

cepte de la taksi-aŭtoj — en la urbeĝo. Oni aŭdos multon pri London Transport, kaj baldaŭ ni publikigos specialan artikolon pri tiu tre kompetenta kaj interesa organizaĵo. Por la dungitoj de London Transport, la Kongresa Komitato aranĝas *Esperanto-klasojn*, kiel ankaŭ por diversaj aliaj tiaj servistoj, por ke ili pli efike povu helpi al la kongresanoj. Nuntempe en Britujo estas preskaŭ neeble aranĝi kursojn de alilandulo, pro oficiala malpermeso de la Laborministerio, sed la Komitato sukcesis havigi permeson por ke iu el la plej lertaj rektmetodaj instruistoj — f-ino M. Saxl — venu al Londono jam en januaro por gvidi tiajn kursojn.

Jen la ĉefaj detaloj de la *provizora programo* :

Sabaton vespere okazos la kutima *Interkonatiga Vespere*, sed nur la venontan matenon oni vidas la veran komencon de la kongreso. Temas pri la *Oficiala Inaŭguro*, kiu okazos en la *Dominion Theatre*, unu el la plej luksaj filmteatroj en Londono, kun sidlokoj por preskaŭ 3.000 personoj. Kaj jen novaĵo, kiu nepre interesos ĉiujn gesamideanojn, kiuj suferis en la estinteco: — dum la inaŭguro, kaj dum ĉiuj aliaj grandaj kunvenoj, estos aranĝita *sistemo de mikrofonoj*, kun la celo ke ĉion povu aŭdi ankaŭ tiuj, kiuj ne havas la bonŝancon sidi en la unuaj vicoj! Dimanĉon posttagmeze okazos la oficiala *Diservo*, kaj lundon vespere la *teatraĵo*. Pri tiuj du aranĝoj detaloj aperos baldaŭ. Mercredon oni ĝuos la oficialajn *ekskursojn*, kaj la Komitato aranĝis por tiu tago du tuttagajn kaj duontagajn ekskursojn.

Plena informo pri ĉiuj ekskursoj kaj ties kostoj aperos post nelonge. Intertempe ni nur mallonge mencios ilin. N-roj 1 kaj 2 estos tuttagaj, kaj N-roj 3 kaj 4 duontagaj. Tiujn lastajn oni kredible ripetos por tiuj kiuj partoprenis 1 aŭ 2.

1. Vizito al « Shakespeare-lando », 350-kilometra rondveturo en luksaj aŭtoĉaroj, kun vizito al la historia kastelo de Warwick, la mondfama urbeto kaj domo de Shakespeare (Stratford-on-Avon), kaj Oxford.

2. 230-kilometra rondveturo en Kent

kaj Sussex, kun vizito al la popularaj marbordurboj Hastings kaj Eastbourne, kaj poste al la flugstacio Croydon. Tiu ĉi rondveturo estos en treege pitoreska regiono, kaj la tuta kosto estos surprize malalta. La samon oni povas diri pri N-ro 1.

3. Simila, sed pli mallonga rondveturo kaj vizito al Whippsnade, la unika kaj ampleksa bestoparko kiu situas en rava kamparo, kaj kie ĉiuj bestoj — preskaŭ eĉ la leonoj! — vagas libere en natura ĉirkaŭaĵo.

4. Rondveturo kaj vizito al Eton, la reĝa kastelo en Windsor, kaj la Palaco Hampton Court.


Plue, je diversaj tagoj oni aranĝos rondveturojn en la urbeĝo mem. Por tiuj, kiuj volas vidi la urbon je minimuma kosto, tamen, estas rekomendindaj la miloj da luksaj duetaĝaj aŭtobusoj kiuj svarmas sur la Londonaj stratoj. Kaj kiam oni nur volas rapide iri de unu loko al alia, nu, ekzistas la eĉ pli luksa unuklasa « Tube » kaj la nur iomete pli modesta « Metro » — ambaŭ subteraj fervojoj. Ĉiu kongresano ricevos facilkompreneblajn planojn pri la aŭtobusoj kaj subteraj fervojoj.

Tiu zenito de ĉiu universala kongreso, la *balo*, okazos jaŭdon en la Balĉambrago de *Alexandra Palace*. Ĉi tiu palacego, (efektive publika ekspoziciejo, ktp.) situas iom norde de la centro de la urbo mem, en propra parko kaj sur la supro de alta monteto, de kie oni ĝuas imponan vidaĵon super Londonon, vidaĵo kiu rajtas konkurenci kun tiu de sur la *Sacr  C eur* en Parizo. Specialaj vagonaroj portos la kongresanojn al kaj de *Alexandra Palace*.

Pri ĉiuj aliaj aranĝoj oni povos baldaŭ legi. Sufiĉas nun mencii nur la ĉefajn. Ĉiam estas dirate, ke kiam oni pasigas sian libertempon ĉe universala kongreso, oni poste bezonas plian libertempon por ripozi! La Komitato ne forgesis tion, kaj aranĝis por tuj *post la kongreso unusemajnan ripozejon*. Temas pri granda kaj bone ekipita gastodomo en bela kamparo proksime de la ĉefurbo. Por distri kaj instrui la partoprenantojn, la konata Cseh-instruisto, Sigismundo Pragano, ĉiutage prelegos pri la literaturo de Esperanto, kaj la ceteron de la tempo oni pasigos ripozante, ekskursante, dancante kaj tiel plu. Al tiuj, kiuj volas partopreni tiun ĉi aranĝon, la Komitato rekomendas fruan aliĝon, ĉar estos akcepteblaj nur cent gesamideanoj. La tuta kosto por la semajno estos 3½ funtoj. Tio enhavos loĝon, manĝojn kaj la kurson, sed ne la koston de aranĝotaj ekskursetoj. La veturkosto de Londono estos tute malgranda.

Okazos ankaŭ postkongresaj ekskursoj; unu al Skotlando kaj kredeble alia en Anglujo mem. Informo aperos post nelonge.

Plue, estas menciinde, ke en la angla



Bela bildo pri la « Foreign Office », la Ministerio por eksterlandaj aferoj, kiu ludis jam tiom gravan rolon en la historio de la mondpolitiko

urbo *Newcastle* oni preparas *antaŭkongreson*, kiu interesos tiujn, kiuj venos al Londono el la skandinavaj landoj kaj tra *Newcastle*. Alia antaŭkongreso estas aranĝata de la fervoraj samideanoj en la nordfranca urbo *Dunkerque*, kaj tiu allogas la kongresanojn, kiuj povos trapasi tiun urbon survoje al Anglujo.

Jen, do, mallonga skizo de la Londona Kongreso. Ne pensu ke tio estas ĉio. Tute ne! Estu certa, ke la Kongresa Komitato, kaj la centoj da gesamideanoj

en Londono, preparas multajn aliajn allogaĵojn kiuj certigos, ke la plej granda urbo en la mondo — kaj ja unu el la plej interesaj — estos neniam forgesibla, kiel la loko de la BRILA KONGRESO DE 1938!

Sed unu averto: la kotizo restos £ 1 nur ĝis la fino de la jaro — poste ĝi iom altiĝos; tial ALIĜU NUN! Aliĝoj jam estas 300.

SEKRETARIEJO: *Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo*.

Tria listo de kongresanoj

18. F-ino Ren e Rivollet, Rickmansworth, Agl.
19. S-ino C. Goldsmith, Rickmansworth, Angl.
166. S-ino E. Gilfillan, Monifieth, Skotlando.
167. F-ino F.L. Wickelgren, Buckhurst Hill, A.
168. F-ino A.L. Richardson, Monkseaton, Angl.
169. F-ino E. McGarvie, Altrincham, Anglujo.
170. F-ino A. Grundy, Middleton, Anglujo.
171. E.M. Rosher, Haslemere, Anglujo.
172. M.P. Merrick, Shepperton, Anglujo.
173. S-ino M.C. Merrick, Shepperton, Angl.
174. S-ino A.V. Morse, Letchworth, Anglujo.
175. Prof. O. Bujwid, Krakow, Polujo.
176. F-ino E. Norman, Birmingham, Anglujo.
177. S-ino B. Meredith, Birmingham, Anglujo.
178. I. H. Wright, Birmingham, Anglujo.
179. S. Pragano, Bucuresti, Rumanujo.
180. F-ino A.G. Macfarlane, Glasgow, Skotlando.
181. F-ino M. Dickson, Portsmouth, Anglujo.
182. D-ro R.H. Crowley, Tewin, Anglujo.
183. S.R.B. Hocking, London, Anglujo.
184. S-ino A.E. Hocking, London, Anglujo.
185. J.W. Holland, Leighton Buzzard, Anglujo.
186. F-ino H. Lawton, Huddersfield, Anglujo.
187. F-ino M. Beaumont, Huddersfield, Angl.
188. Prof. E. Migliorini, Roma, Italujo.
189. I. Gomes Braga, Rio de Janeiro, Brazilo.
190. W. J. Drake, London, Anglujo.
191. S-ino L. C. Drake, London, Anglujo.
192. W. O. Bishop, London, Anglujo.
193. S-ino W.M. Bishop, London, Anglujo.
194. W. Baaten, Utrecht, Nederlando.
195. F-ino M. Jay, London, Anglujo.
196. S-ino E.M. Kendrick, East Molesey, Angl.
197. S-ino M.C. Gillett, Banbury, Anglujo.
198. F-ino D. Roche, London, Anglujo.
199. M. Rollet de l'Isle, Paris, Francujo.
200. F-ino N. Wilford, Nottingham, Anglujo.
201. H.L. Gandell, London, Anglujo.
202. J. F. Jackson, Willaston, Anglujo.
203. S-ino H.E. Jackson, Willaston, Anglujo.
204. N.C. Smith, Oxford, Anglujo.
205. J.F. Dinslage, London, Anglujo.
206. S-ino C. Dinslage, London, Anglujo.
207. E.E. Yelland, Aspremont, Francujo.
208. S-ino T. Yelland, Aspremont, Francujo.
209. F-ino M.F. Clark, London, Anglujo.
210. J.C.G. Briggs, Nottingham, Anglujo.
211. F-ino E. Skov, Nr. Alslev, Danujo.
212. F.B. Bourdillon, Oxford, Anglujo.
213. H. Ingham, Chesterfield, Anglujo.
214. F-ino M. Ingham, Chesterfield, Anglujo.
215. A. Faes, Antwerpen, Belgujo.
216. S-ino L. Faes, Antwerpen, Belgujo.
217. F-ino E.A. Jones, Kingston-on-Thames, A.
218. G.B. Hunter, Edinburgh, Skotlando.
219. M. Pearson, Sheffield, Anglujo.
220. F-ino E.G.R. Chaundy, Oxford, Anglujo.
221. G.T.S. Hinton, Chenies, Anglujo.
222. S.E. Barnard, London, Anglujo.
223. F-ino J.J.M. Tetterode, Lochem, Nederl.
224. F-ino S.W. Bloemendal, Lochem, Nederl.

225. F-ino C. Franken, 's Gravenhage, Nederl.
 226. F-ino R. Bye, Oslo, Norvegujo.
 227. L. Sandberg, Bekkelaget, Norvegujo.
 228. O.B. Sletteröd, Ulleval Haveby, Norvegujo.
 229. S-ino A. Sletteröd, Ulleval Haveby, Norv.
 230. P. L. Wright, London, Anglujo.
 231. S-ino G. Wright, London, Anglujo.
 232. E.D. Durrant, Harrow, Anglujo.
 233. S-ino C.B. Durrant, Harrow, Anglujo.
 234. F-ino K. Clamp, London, Anglujo.
 235. S-ino M.C. Major, London, Anglujo.
 236. C.H. Kohl, Welling, Anglujo.
 237. S-ino C.M. Kohl, Welling, Anglujo.
 238. J. Newby, London, Anglujo.
 239. C. Lehane, London, Anglujo.
 240. S-ino H.M. Ongley, London, Anglujo.
 241. F-ino B. Durkin, London, Anglujo.
 242. F.H. Alexander, London, Anglujo.
 243. A. Venture, London, Anglujo.
 244. S-ino E. Venture, London, Anglujo.
 245. F-ino A.E. Whitman, London, Anglujo.
 246. F-ino M.W. Broome, London, Anglujo.
 247. V.L. Alexander, London, Anglujo.
 248. W.B. Ross, London, Anglujo.
 249. F-ino D.F. Nicholson, Ruislip, Anglujo.
 250. S-ino E. Nicholson, Ruislip, Anglujo.
 251. S-ino M.F. Simons, Edinburgh, Skotlando.
 252. S-ro Simons, Edinburgh, Skotlando.
 253. F-ino A. E. Frankamp, Delft, Nederl.
 254. D-ro C.M. Bean, London, Anglujo.
 255. A. Englemann, Rosny-sous-Bois, Francujo.
 256. F-ino F. Mc Laren, London, Anglujo.
 257. A. G. Tucker, Canterbury, Anglujo.
 258. R. W. Rayner, Cambridge, Anglujo.
 259. G. Vermandere, Antwerpen, Belgujo.
 260. S-ino J. Vermandere, Antwerpen, Belgujo.
 261. S-ino G.H. Moxon, Leigh-on-Sea, Anglujo.
 262. A.C. Bond, Swansea, Kimrujo.
 263. S-ino G.P. Weston, London, Anglujo.
 264. R.E.A. Hammond, Paris, Francujo.
 265. F-ino R. Randall, London, Anglujo.
 266. A.R. Tancredi, Savona, Italujo.
 267. F-ino E. Tallent-Bateman, Chapel-en-le Frith, Anglujo.
 268. F-ino N. E. Powers, Windsor, Anglujo.
 269. J.A. Gill, Croydon, Anglujo.
 270. F-ino A. Waite, Birmingham, Anglujo.
 271. N. Wooding, Leicester, Anglujo.
 272. F-ino W. Willison, Birmingham, Anglujo.
 273. F-ino B.C. Briggs, Nottingham, Anglujo.
 274. G. Roome, Sheffield, Anglujo.
 275. S-ino N. Roome, Sheffield, Anglujo.
 276. H.O. Schoffield, Nottingham, Anglujo.
 277. C.L. Hinton, Harpenden, Anglujo.
 278. S-ino L.W. Hinton, Harpenden, Anglujo.
 279. J. Leroux, Edgware, Anglujo.
 280. Rezervita de Newcastle Esp.-Soc., Angl.
 281. F-ino S. Dietrichson, Oslo, Norvegujo.
 282. F-ino A. Walle, Oslo, Norvegujo.
 283. F-ino E.A. Sidebottom, London, Anglujo.
 284. J.A. Johnston, Carshalton, Anglujo.
 285. S-ino J.N. Alexander, London, Anglujo.
 286. C.H. Toms, London, Anglujo.
 287. E.P. Ockey, London, Anglujo.
 288. S-ino E.A. Ockey, London, Anglujo.
 289. F-ino E. Mallett, Edgware, Anglujo.
 290. L. Komar, London, Anglujo.
 291. S-ino E. B. Knight, London, Anglujo.
 292. S-ino A. Colyer, London, Anglujo.
 293. M. Lewin, London, Anglujo.
 294. S-ino E. Lewin, London, Anglujo.
 295. F-ino A.C. Grimmit, London, Anglujo.
 296. Brazilo Ligo Esp., Rio de Janeiro, Brazilo.
 297. A. Allen, Leek, Anglujo.
 298. Amikino de F-ino A.B. Holness, New Bar-net, Anglujo.

*

LAŬLANDA STATISTIKO DE LA ALIGINTOJ.

Anglujo, 185; Aŭstrujo, 2; Belgujo, 5; Brazilo, 2; Ĉeĥoslovakujo, 1; Danujo, 1; Finnlando, 2; Francujo, 19; Germanujo, 4; Irlando, 1; Italujo, 3; Kanado, 1; Kimrujo, 3; Nederlando, 10; Norvegujo, 8; Polujo, 5; Rumanujo, 1; Skotlando, 12; Svedujo, 1; Svisujo, 1; entute 267 el 20 landoj.

Kial ni amas nian Majstron ?

(Okaze de la 78-a datreveno de lia naskiĝotago.)

Ĉu esperantistoj aranĝas aŭstrian, ĉu svedan, ĉu japanan vesperon, ĉiam ŝvebas super ni la spirito de l' kreinto de Esperanto, D-ro L. Zamenhof, kaj liaj ordonoj.

Ĉar mirindan potencon eksposedis nia majstro en la esperantistaro dum sia vivo kaj eĉ post foriro en pli bonan mondon.

Li regis ne sole niajn *mensojn*, nian intelekton, kiu komprenis, ke la Zamenhofa verko estas grandioza, neordinara fakto, — ke ĝi eble iam permesos kunligi en unu « rondon familian » diversajn naciojn, rasojn, konvinkojn —, li regis ankaŭ niajn *ĥorojn*, niajn sentojn.

Ni lin amegis, admiris. Kiamaniere konkeris niajn korojn homo modesta, ĉiam sin kaŝanta en angulo, homo posedanta influojn nek en la registaraj, nek en sociaj rondoj, kuracisto, ofte batalanta kun financaj mankoj, idealisto, fantaziulo, primokata de la aŭtoritatoj, gazetaro?

*

Mi devas esprimi en tiu loko mian konvinkon pri Esperanto. De la unua momento ni, malnovaj esperantistoj, estis frapitaj de ĝia simpla strukturo, logikeco, novaj kaj pravaj principaj reguloj. Ni konsideris Esperanton ideala solvo de la helplingva problemo, kiu tute ne devas timi konkurencon de aliaj provoj, antaŭaj (Volapük) kaj postaj (ĝis nun aperis ĉirkaŭ 100 novaj lingvoj). Ni estis konvinkitaj, ke Esperanto estas feliĉa, mirinde sukcesinta sintezo, ke ĝi estas verko de geniulo, simile al leĝo de Newton aŭ radio de Marconi.

Sed ĉu la mondo montris *ĥoran* rilaton al Newton aŭ Marconi? Ne, la mondo ilin kaj aliajn geniulojn admiris, donacis al ili honorajn titolojn, Nobel-premiojn ktp.

Kial do esperantistoj, disĵetitaj en la tuta mondo, esprimadis ĉiam tute alian, *elĥoran simpation* al nia majstro?

Eble tial, ke li ne ricevis la Nobel-premion, ne riĉiĝis?

Mi kredas, ke ne tie ĉi kuŝas la kaŭzo. Tiom pli, ke Zamenhof ĝisvivis multajn honorajn, ordenojn, estis ne unufoje akceptita de reĝoj kaj regnestroj, mem vidis monumenton, starigitan al lia honoro (ekz. en Franzensbad), bone sciis pri multaj Zamenhofaj stratoj kaj placoj en diversaj landoj.

*

Permesu, karaj gesamideanoj, ke mi por unu momento deflankiĝu de la temo. En la historio de eltrovaĵoj ni ne malofte renkontas saĝajn sciencajn teoriojn, mirindajn inventojn, kies aŭtoroj, forgesitaj, mortadis en mizero. Okazas eĉ, ke post multaj jaroj la saman forĵetitan, primokitan teorion aŭ eltrovon

eltiradis iu alia, anoncadis sin ĝia aŭtoro kaj famiĝadis.

Kial? Ĉar ne sufiĉas *inventi* aŭ *ek-pensi novan teorion*, sed necesas ankaŭ *sciigi ĝin popularigi, disvastigi, konvinki pri ĝiaj valoroj la mondon*.

Iuj eble dirus, ke mankis al Esperanto reklamo, mankis gazetara propagando, prelegoj pri nova gazeta eltrovo.

Ne! Zamenhof *venkis ĝuste tial, ke li ne uzadis reklamon*, ne laŭdis mem sian verkon, ne faris bruon ĉirkaŭ sia persono.

Ĉar Zamenhof, la 100%-a idealisto, profunde konis la mondon, la realajn faktorojn en ĝi regantajn. Tio savis la lingvon. Zamenhof bone antaŭvidis la homan envion, la eventualajn suspektojn pri lia ambicio, monamo, monemo, honoraspiroj ktp. Kaj Zamenhof *distranĉis ĉiujn suspektojn per unu tranĉo*.

Li senpage forsendadis el sia kabineto milojn da lingvaj konsiloj, li transdonis ĉiujn siajn personajn rajtojn al la esperantistaro (« la lingvo estas posedaĵo de ĉiuj esperantistoj »), — jam en 1893, t.e. ses jarojn post apero de Esperanto, kiam troviĝis esperantistoj reformemaj, li mem aranĝis plebisciton kaj deklaris anticipe sian plenan obeon al ĝiaj decidoj, — fine en 1912, dum la Universala Kongreso en Kraków, kiam la Esperanta movado sufiĉe maturiĝis, li faris la kontantan deklaron: « Ĝis nun mi estis antaŭ vi, de nun mi estos *inter vi* ».

Ĝuste dank' al tiuj ecoj de granda prudento, modesto, takta rilato al ĉiuj, demokrateco, — li akiris nian amon, niajn korojn.

Tio kaŭzis la grandan estimon kaj adoron ne nur de samideanoj, sed ankaŭ flanke de multaj potencaj spiritoj, kiel ekz. Max Müller, Lev Tolstoj, August Forel, Charles Richet k.a.

Tial al la teatra loĝio, kie sidis la majstro, marŝadis vico da regnaj aŭtoritatoj, scienculoj, ĵurnalistoj. Tial en Cambridge oni renkontis Zamenhof'on kun preskaŭ reĝaj honoroj: en la stacidomo la skota gvardio ludis anglan kaj esperantan himnojn, la tuta urbo estis ornamita per esperantaj flagoj kaj la Universitato Senato atendis lin por oficiala akcepto.

Tiun miraklon jam en 1907, t.e. antaŭ 30 jaroj, povis okazigi nia majstro ne dank' al la lingvo mem, kiu tiam estis ankoraŭ « muziko de l' estonteco », sed dank' al siaj personaj kvalitoj kaj al la ideo de Esperanto.

D-ro Wilhelm Róbin.

(Parolado farita okaze de Aŭstria Vespero en Varsovio, antaŭ la 28-a Univ. Kongreso en Wien.)

Plimultigo de Esperanto-dissendoj en itala Radio

Komence de decembro, la Italaj Kronikoj pri l' Turismo estos disaŭdigataj per la **mezlongonda stacio Romo II** (245 m.) kaj per la **mal-longonda stacio ZRO** (31,13 m.), relakse, de 19.10 ĝis 19.26 laŭ Mez-Eŭropa Tempo, t.e. de 18.10 ĝis 18.26 laŭ Greenwich, kaj de 18.30 ĝis 18.46 laŭ Amsterdam. Tiamaniere la Esperanto-Fako ĉe la Ĝenerala Direkcio por la Turismo havos je sia dispono du staciojn, kaj eĉ la plej malproksimaj samideanoj povos aŭdi la voĉon el Romo. La dissendoj okazos ĉiusabate

La Esperanto-Fako nuntempe preparas ĉion necesan por la **4-a Konkurso**, kiu estas malfermata en januaro 1938. La kondiĉoj de tiu ĉi Konkurso estos multe pli facile plenumebloj ol tiuj de la antaŭa Konkurso; tial oni atendas amasan partoprenadon de la esperantistaro tutmonda.

Krom la sabataj Esperanto-dissendoj baldaŭ okazos aliaj lunde kaj jaŭde. Komence de decembro oni starigos, ĉe la Esperanto-Fako, ankaŭ **Propagand-Politikon Fakon**. Ĉiun lundon kaj ĉiun jaŭdon je 22.00 laŭ MET (21.00 laŭ GMT, 21.20 laŭ nederlanda tempo) la stacioj Romo I (420,8 m.) kaj ZRO (31,13 m.) dissendos informojn en Esperanto pri la plej gravaj italaj kaj eŭropaj okazaĵoj.

*

La decido de la itala « Ministero della Cultura Popolare » (Ministerio de la Kulturo Popola), pli frue Ministerio por la Gazetaro kaj la Propagando, t.e. de ĝia Ĝenerala Direkcio por la Turismo, signifas *konsiderindan plimultigon de la uzado de Esperanto* en la oficialaj italaj radio-dissendoj. Tiu decido pravas, ke la itala Ministerio por la Gazetaro kaj la Propagando estas kontenta pri la ĝisnuna rezultato de la esperantlingvaj dissendoj, kaj ke ĝi taksas ilian efikon sufiĉe grava por eĉ plimultigi la Esperanto-dissendojn.

Speciale atentinda estas la decido pri *starigo de Propagand-Politika Fakoj* ĉe la Esperanto-Fako de la Ĝenerala Direkcio por Turismo kaj pri koncernaj dissendoj dufoje ĉiusemajne, nome dissendoj pri italaj kaj eŭropaj okazaĵoj, kompreneble laŭ la itala, faŝista vidpunkto. Nenio pli trafte refutas la senbazan aserton pri « Esperanto — komunista lingvo » ol la fakto de tiu ĉi decido. Esperanto estas nek speciale komunista nek speciale faŝista nek ankaŭ speciale demokrata lingvo, sed Esperanto estas helpa lingvo por ĉiu kiu volas ĝin uzi. Antaŭ jaroj, efektive, ĝi estis vaste uzata de sovetaĵ sendstacioj por propagandi politikajn ideojn laŭ la vidpunkto bolŝevika, kaj povas impresiom strange la fakto, ke la sovetaĵ stacioj ŝajne ne plu, aŭ nur malgrandskale, aplikas Esperanton, dum ke nuntempe ĝuste faŝistaj registaroj: la itala kaj la brazila, donas al ĝi tiel okulvidan rekonon. Aliflanke oni devas ankaŭ miri, ke Germanlando kaj Portugalujo ne

partoprenas nuntempe en la rekono de Esperanto. Germanlando pasintjare eĉ postulis de la enlandaj organizoj mondlingvaj ke ili sin likvidu; kaj de la internacia semajna Esperanto-jurnalo, ĝis tiam publikigita en Germanlando, oni same postulis ke ĝi ĉesigu sian aperadon sur germana teritorio. Postuloj, laŭ diversaj vidpunktoj tute ne kompreneblaj, ĉar oni ne samtempe malpermesis la uzadon de la lingvo, la posedon de Esperanto-libroj, aŭ la ricevadon de Esperanto-gazetoj eksterlandaj. Krom tio, la argumento, per kiu oni motivigis la strangajn postulojn (ke « artefarita lingvo estas kontraŭ la principoj de l' nacionalsocialismo ») estis ja nura aserto tute senbaza kaj neniel pruvita nek pruvebla: ja ankaŭ artefarita ĉevalo (lokomotivo aŭ aŭtomobilo), artefarita birdo (aeroplano), artefarita skribo (per skribmaŝino), muziko per artefaritaj instrumentoj, artefaritaj farboj, artefarita kaŭĉuko, aŭ eĉ artefaritaj elementoj en la nacia lingvo ne estas kontraŭ la principoj de l' nacionalsocialismo.

Eble, kiam Italujo oficiale plimultigas sian intereson por Esperanto, kaj kiam Brazilo ĵus eldonis specialan poŝtmarkon por memori pri la Ora Jubileo de Esperanto, eble nun estus taŭga momento, provi paŝon ĉe la germanaj aŭtoritatoj por atingi « rehabilitigon » (rehonorigon) de nia afero.

Oni povas kontraŭdiri, ke la plimulto de l' esperantistoj estas nek faŝistoj nek nacionalsocialistoj, aŭ estas eĉ kontraŭaj al tiuj sistemoj politikaj, kaj ke oni do tute ne havas intereson regajni la triaregan registaron, por ke ĝi reallasu la publikan propagadon por Esperanto aŭ eventuale mem ĝin uzu oficiale por turismo aŭ eĉ politika propagando. Sed ni ne forgesu, ke nia celo estas *enkonduki Esperanton en la praktikan vivon*. Nia celo estas alporti al la mondo unue la buŝan kaj, kiom eble, ankaŭ la koran (« interna ideo ») interkomprenon. Kaj, ni ja konfesu, kaj la faktoj ĝin pravas, ke la pli malpli diktatoraj registaroj — inkluzive de la soveta — posedas multe pli grandan aŭtoritaton kaj ĝenerale ankaŭ pli grandan konstantecon ol la registaroj demokratiaj. Tial sukceso por nia afero ĉe la itala, la brazila, la regno-germana, aŭ ankaŭ ĉe la soveta registaro, havas por ni esence pli gravan signifon ol sukceso ĉe la registaro de iu demokrata ŝtato, kiu povas ĉiumomente ŝanĝiĝi kun siaj tendencoj, ŝatoj kaj malŝatoj por iu afero, kvankam sukceson ĉe demokrata registaro ni kompreneble ĉiam kun speciala ĝojo aklamamos.

Ni esperantistoj devas en la batalo por nia afero esti tute prudentaj kaj raciaj. Ni povas mem esti plej konvinkitaj demokratoj; sed ni ne povas nei ke la supre dirita estas prava.

En la intereso de nia afero ni salutas do la decidojn de la itala Ĝenerala Direkcio por la Turismo, kaj esperas ke ili havos la plej kontentigajn konsekvencojn.

Esperanto sur „Conte Grande”

« Conte Grande » estas unu el la plej grandaj kaj belaj ŝipoj de la itala transocea trafiko, kun 25.660 toneloj. En la triaklasa salono de tiu oceangiganto, la 8-an de novembro, invitiite de la estraro de « Mara Poŝtlaboro », nia samideano Prof. Agostino Stellacci, ŝipkapelano, parolis pri « Esperanto, trafa propagandilo de Italio eksterlanden ». Ĉeestis multnombra kaj klera aŭskultantaro.

La parolanto, per simplaj, trafaj, konvinkaj vortoj vekis la atenton de ĉiuj. Li parolis pri la deveno de l' helplingvo, pri la vivo de Zamenhof, pri la mirinda progresado de la lingvo neŭtrala tra la tuta mondo en praktikaj kaj ĉiutagaj bezonoj, atentigante pri la agado de la Faŝista Ŝtato por la disvastigado de Esperanto per ĝia praktika uzado. Li rakontis kortuŝajn vojaĝ-aventurojn, uzante la okazon por montri, kiamaniere Esperanto estas trafa propagandilo por Italio kaj italeco eksterlanden. Sian paroladon li ilustris per Esperantaĵoj el diversaj mondpartoj, per Esperanto-gazetoj, foirreklamiloj, per la brazila poŝtmarko eldonita okaze de la Ora Esperanto-Jubileo. Post la parolado okazis mallonga Esperanto-leciono laŭ la Cseh-metodo, kiu vekis grandan intereson.

Ĉeestis la paroladon, krom la oficistaro kaj maristaro, ankaŭ la Reĝa Komisario Kom. D-ro Tommaso Mancini, komerca konsilanto ĉe la Itala Ambasadejo de Rio-de-Janeiro, Prof. Albanese de la Universitato de S. Paulo, la dua Komandanto Kapitano Musella, la estro de Poŝtlaboro Kap. Bonelli, kaj multaj pasaĝeroj de ĉiuj klasoj.

Tondrajn aplaŭdojn kaj unuanimajn aklamojn akiris la parolinto, kaj multaj personoj sekvos la kurson, kiun gvidos Prof. pastro Stellacci laŭ Cseh-metodo sur la sama ŝipo. La ĵusa sukceso de nia fervora samideano signifas gravan paŝon survoje al la enkonduko de Esperanto en la italan, kaj certe ankaŭ en la tutmondan, komercan ŝiparon.

◆
Grava peto. Por propagandaj celoj estas grave ke kiel eble plej multaj esperantistaj kaj naciaj gazetoj represu tute aŭ ekstrakte la ĉiusupran artikolon, kaj ke oni sendu 1-2 kopiojn de la koncernaj gazetoj al jena adreso, por plua enpenetro en gravaj rondoj: Prof. Agostino Stellacci, Ŝipkapelano « Conte Grande », Vicoletto Trinità Spagnoli 3, NAPOLI, Italio.

PROPAGANDO

Propaganda prelego farita dum la Jubilea Kongreso en Varsovio de E. Malmgren

(Daŭrigo.)

6. La kontakto inter klubo kaj landa asocio.

Antaŭe mi akceptis la gravecon pri konstanta kontakto inter la internacia centro kaj la landaj asocioj. Estas same necese krei viglan kontakton inter la estraro de la landa asocio kaj ĉiuj kluboj. La landa estraro memkompreneble distribuas siajn informojn pere de la enlanda Esperanto-gazeto aŭ pere de cirkuleroj. Sed devas esti reciproka kontakto. Kaj por faciligi la raportadon de la kluboj mi konsilas al la landaj asocioj pretigi raportblankedojn. La kluboj senpage ricevos tiujn blankedojn kaj estas devigataj ĉiun trian monaton sendi la kvaronjaran raporton al la landa asocio. Jam dum la pasinta vintro mi faris tiun ĉi proponon al ĉiuj landaj asocioj, sed ĝis nun nur kelkaj efektivigis la ideon. La aliaj hezitas, ĉar ili opinias, ke iliaj kluboj ne plenumos la raportadon. Mi ankaŭ estas certa, ke ili pravas! Ĉar dum la unua jaro aŭ eĉ dum la du unuaj jaroj certe multaj kluboj ne raportos. Sed la landa asocio ne laciĝu per cirkulero admoni la klubojn ensendi la raportojn. Kaj vi vidos, ke post unu aŭ du jaroj la raporta sistemo funkcios preskaŭ perfekte. Kaj ke la kreita raportsistemo ne nur utilas al la landa centro sed ankaŭ al la kluboj mem, kiuj pro la raportado devas havi ordon en sia kluba vivo. Do duobla utilo!

7. Prelegoj.

La Esperanto-klubo devas esti la torĉo, kiu vivtenas la internacian fajron en la urbo. La klubo ankaŭ havas specialajn eblecojn por tio, ĉar ĝi ja apartenas al vere internacia ligo. Kaj tiu ligo povus peri al la kluboj internaciajn prelegojn, internaciajn teatraĵojn, kaj internacian muzikon.

En multaj landoj oni jam komencis aranĝi prelegvojaĝojn por eksterlandanoj. Tiu maniero por kontaktigi la enlandan publikon kun nia lingvo estas sendube bonega. La ĝisnunaj spertoj estas ankaŭ tre esperigaj. Mi certe ne bezonas atentigi la klubojn kaj la landajn asociojn pri tio, ke oni ne dungu prelegiston antaŭ ol oni kontrolis la prelegiston rilate al elparolo, lingva perfekteco, kapablo kontentige prezenti bonhumoran programon.

Alia prelegmaniero estas havigi el la eksterlando skribitajn turismajn prelegojn. En Svedlando 2 serioj (kun po 50

lumbildoj!) jam estas pretigitaj kun ekonomia subteno de la oficiala organizaĵo Sveda Trafik-Oficejo. La franca kaj ĉeĥoslovaka asocioj ricevis la promeson dum la aŭtuno distribui la prelegon al siaj kluboj. Aliaj landoj estas petataj tuj pretigi similan prelegon kun lumbildoj pri sia lando. Certe iu oficiala organizaĵo estas preta ekonomie helpi la pretigon de tiu ekstreme bona turistreklaĵo. Mi atentigas pri tio, ke la prelego ne daŭru pli longe ol unu horon kaj ke la enhavo nepre estu ne nur instrua sed amuza kaj interesa kun enplektitaj anekdotoj ktp. Ankaŭ pretigu la lumbildojn ne el vitro sed el brulsekura filmo, ĉar alie oni konstante havas disrompitajn bildojn. Mi insiste petas la estrarojn de ĉiuj landaj asocioj pretigi tiajn turistprelegojn. La Filia Oficejo de IEL kolektos la seriojn kaj poste disponigos ilin al tiuj landoj, kiuj petis pri ili. Se iu deziras detalajn klarigojn pri la pretigo, skribu al mi.

Ĉar en multaj malgrandaj kluboj oni ne disponas lumbildaparaton, oni povas pretigi — por ilustru la prelegon — bildkartonojn. Oni algluas kolorigitajn tipajn bildojn sur kartonoj, proks. 30 × 40 centimetrojn. Kiam temas pri kluboj kun malpli ol 50 membroj, tiu maniero estas aplikebla. Kaj kostas malmulte. La nederlanda kaj sveda asocioj jam interŝanĝis tiajn prelegojn.

8. Teatraĵoj.

Jam antaŭe mi diris, ke la klubo plej bone fartas, se oni kiom eble plej multe dividas la laboron inter la klubanoj. Ĉiuj devas senti sian respondecon, ĉiuj devas havi la kredon, ke la vivo kaj la vigleco de la klubo estas absolute dependa de li mem.

El tio montriĝas, ke ne sufiĉas, ke oni en la klubo aranĝas ĉiusemajne belajn prelegojn, ĉar tio povas enuigi speciale la komencantojn. Memoru, ke ankaŭ la komencantoj devas ricevi labortaskojn. Kion do ili povas fari? Nu, ili povas ludi teatron. Multaj opinias, ke teatraĵo devas esti longa, kaj ke oni bezonas multajn aranĝojn. Granda eraro. Oni povas aranĝi teatraĵojn, kiuj estas ludeblaj en du minutoj! Kaj en tiaj mallongaj skeĉoj eĉ la plej verdjuna esperantisto povas kunludi.

Mi plej forte rekomendas al ĉiuj kluboj aranĝi tiajn teatrovesperojn, ĉar ne nur la aŭskultantaro amuziĝas sed ankaŭ la ludantoj mem. Kaj krom tio la lud-

antoj, se ili estas komencantoj, bone ekzercas la lingvon dum la ripetado kaj dum la ludado.

La Filia Oficejo de IEL jam povas liveri kelkajn multobligitajn teatraĵojn. Sed mi esperas, ke multaj esperantistoj en multaj landoj bonvolos sendi al mi aliajn verkojn (originalajn aŭ tradukitajn), por ke ni baldaŭ posedu belan kolekton de teatraĵoj. Tiel la Esperanto-kluboj vere povos prezenti al siaj membroj ion unikan, nome teatraĵojn el la tuta mondo. Memoru, ke eĉ la plej simpla verkaĵo estas bonvena. La teatraĵojn ni multobligos kaj vendos por 2 respondkuponoj (por ĉiu numero). Per tiu prezo ni esperas kovri la kostojn por afranko, papero kaj multobligado.

La jenaj teatraĵoj nun estas je dispono de la Esperanto-kluboj:

el *Belgujo* n-ro 1: « La kolbasoj » de Jeanne van der Veken-van Bockel (ludebla en 15 minutoj);

el *Hungarujo* n-ro 2: « La paĝio de l' reĝino » de E. Heltai kaj E. Makai (ludebla en proks. 1 horo);

el *Norvegujo* n-ro 3: « La skandalo » de Carl Haave (ludebla en 2 minutoj);

n-ro 3: « La hispana etiketo » de Carl Haave (ludebla en 4 minutoj);

n-ro 3: « Ĉarlatanaĵo » (ludebla en 4 minutoj);

n-ro 3: « La diktafono » (ludebla en 15 minutoj);

el *Svedujo* n-ro 4: « Streko en la kalkulado » de E. Julin laŭ franca ideo (ludebla en 20 minutoj);

n-ro 5: « Profesoro Forgesulo » de E. Julin (ludebla en 4 minutoj);

n-ro 5: « Ĉe la dentisto » de E. Julin (ludebla en 10 minutoj);

n-ro 5: « En la vagonaro » de E. Julin (ludebla en 5 minutoj).

Jen la jam pretigitaj teatraĵoj. Mi esperas, ke ni per helpo de multaj esperantistoj baldaŭ povos kompletigi la liston. Ni publikigos ĝin en la Esperanto-gazetaro.

Antaŭ ol mi finas pri la teatra ĉapitro, mi substrekas la neceson, ke ĉiu klubo elektu specialan teatro-komitaton, se la estraro mem ne volas gvidi tiun flankon de la kluba laboro. (Daŭrigota.)

La kontraŭuloj asertas

ke Esperanto ne povas vivi. Sed ĝi jam vivas en siaj kongresoj kaj konferencoj; ĝi vivas vigle en dekoj da gazetoj; ĝi vivas tre forte en centoj da kluboj kaj asocioj; ĝi vivas en miloj da libroj; ĝi vivas en dekmiloj da prospektoj kaj broŝuroj; ĝi vivas en milionoj da leteroj; ĝi vivas — antaŭ ĉio — en la koroj de siaj fervoraj adeptoj kaj propagandantoj tra la mondo, el kiuj ĝi jam ne estas elŝirebla.

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 51. 22-an de Oktobro, 1937.

NOVAJ DELEGITOJ.

- Britujo.**
North Ferriby (Yorkshire). — D: F-ino F. D. Priestman, 2, Humberdale Drive.
Ĉeĥoslovakujo.
Moravská Ostrava (Moravio). — Nova D: S. Strelec, u Soudu 4.
Francujo.
Nancy (M. & M.) — FD. (PTT-aferej): L. Collin, 39, Rue Augustin Hacquard.

SANGOJ.

- Alĝerio.**
Alger. — Ni bedaŭras, ke la D., S-ino Marchal, devis ekŝigi pro malsano.
Britujo.
Burntisland. — VD: F-ino E. Anderson, nova adreso: « The Grange ».
Crewe. — D: E. Lee, nova adreso: 20, Richard Moon Street.
Scunthorpe. — D: C. Jones, nova adreso: 5, Clarke Street, Scunthorpe.
Polujo.
Warszawa. — FD. (Juro & Gazetaro): H. Gielb. Provizore loĝas en Francujo, ĉe S-ro P. Neukomm, 320, Rue du Montet, Nancy. Ankorau funkcias kiel FD.

ERARO EN SUPLEMENTO.

- Britujo.**
Croydon. — Ni bedaŭras, ke ni erare indikis la ekŝigon de la D., S-ro E. K. Jayne, kiu efektive daŭre funkcias.

30-a UNIVERSALA KONGRESO, Londono 30.7.1938—6.8.1938.

Ĝis la hodiaŭa dato aliĝis jam 185. POŝTKARTOJ kun bildo de la kongresejo kaj teksto en Esperanto estas nun haveblaj de la Centra Oficejo.
 Prezo: 60 — 2 ŝil. aŭ 10 respondkuponoj afrankite.
 12 — 8 pencoj aŭ 3 respondkuponoj afrankite.
 (Poŝtkartoj ne estas sendeblaj kiel presaĵo.)
 C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 52. 3-an de Novembro, 1937

NOVAJ DELEGITOJ.

- Hungarujo.**
Budapest. — FD. Fervojistaj kaj Stenografaj Aferej kaj Fremdultrafiko: T. Kovács, Her-nád u 6, fszt. 9, Budapest VII.
Nederlando.
Apeldoorn (Gelderland). — D: H.H. Ypma, Jachtlaan 157.
Schiedam (Zuid Holland). — D: F-ino M. Wessel, v. Ruysdaellaan 38-a.

SANGO.

- Hungarujo.**
Felsögöd. — Pro translokiĝo provizore ne estas Delegito.

MONATA STATISTIKO

Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Oktobro, 1937:
 Individuaj Membroj:

Asociaj Membroj	9610
MJ	1153
MA	995
MAH	249
MS	133
DM	74
HM	31
Patronoj	13
	2648

12258 en 60 landoj

Korespondantoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Oktobro, 1937:

Ricevitaj	659
Senditaj	3075
	3734

JARLIBRO 1938.

En la lastaj tagoj ni dissendis al la Delegitoj Bultenon N-ro 4 kaj Respondilon pri la Jarlibron. Se iu ne ricevis tiun sendaĵon, li bonvolu tuj sciigi la Centran Oficejon por ke ni sendu duplikatojn.

LONDONA KONGRESO, 1938.

Ĝis hodiaŭ aliĝis 232 personoj.

INTERNACIA KONKURSO

Stato je la 31a de Oktobro 1937.

	POENTOJ		%
	1935	1937	
1. Norvegujo	120	580	483.3
2. Aŭstrujo	255	729	286.0
3. Danujo	585	1118	191.1
4. Hungarujo	490	619	126.3
5. Grekujo	110	137	124.5
6. Bulgarujo	75	92	122.6
7. Usono	1264	1461	115.6
8. Italujo	560	591	105.5
9. Nov-Zelando	210	210	100.0
10. Britujo	6469	6380	98.5
11. Litovujo	150	135	90.0
12. Aŭstralio	470	419	89.1
13. Svedujo	2984	2492	83.5
14. Belgujo	2081	1722	82.7
15. Azio	1615	1264	78.2
16. Sud-Ameriko	1025	799	77.8
17. Portugalujo	395	307	77.7
18. Kanado	100	74	74.0
19. Francujo	7909	5797	73.3
20. Nederlando	4815	2822	58.2
21. Ĉeĥoslovakujo	4040	2235	55.3
22. Polujo	685	318	46.4
23. Jugoslavujo	615	242	39.3
24. Afriko	395	137	34.7
25. Finnlando	195	61	31.3
26. Latvujo	265	55	20.3
27. Rumanujo	400	45	11.2
28. Svislando	1410	137	9.7
29. Estonujo	130	5	3.8
30. Hispanujo	2080	15	0.7

41897 30998 74.0
 Meza%

KOTIZOJ 1938.

Tabeloj pri la kotizoj kaj pri la premioj por Subtenantoj troviĝas apude. Ni insiste petas, ke

precipe la MA kaj MAH pagu sian kotizon sen prokrasto, por eviti interrompon en la ricevo de la gazeto. Al MA ni ne sendos « Esperanto Internacia » post la februara numero se ni ne estos ricevintaj la kotizon. Al MAH ni ne sendos « Heroldo de Esperanto » post la fino de Januaro, se ni ne estos ricevintaj la kotizon.

C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

Imitinda ago!

Lastatempe IEL nomis kiel Delegiton por la grava urbo Columbia (South Carolina), Usono, s-ron V. Dibble, kiu estas la sekretario de la Komercesta Asocio de Columbia. Je la 9-a de oktobro aperis anonco pri tio en la plej grava tagjurnalo de la urbo kun la diklitera titolo: « Dibble Elektita Delegito por la Urbo ». Sekvis interese verkita klarigo pri la devoj de IEL-Delegito. Ni gratulas s-ron Dibble pro tiu tre imitinda sukceso.

Oficiala Informilo

N-ro 53. 11-an de Novembro 1937

NOVAJ DELEGITOJ.

- Jugoslavujo.**
Beograd. — D: O. Avsec, Karadjordjeva ul. 59.
Maribor. — D: F. Klanjek, Glavni trg. 21.
Nederlando.
Leiden. — VD: M. van de Kreeke, de Laar de Kanterstraat, 29.

ADRESOSANGOJ.

- Francujo.**
Cannes. — D: R. Gilles, 95, Rue d'Antibes.
Svedujo.
Norrköping. — D: C. B. Alf, Skolgatan 27.
Svisujo.
Genève. — D: H. Vatré, Ave. de la Grenade 21.
 C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 54. 18-an de Novembro, 1937

NOVAJ DELEGITOJ.

- Maroko.**
Casablanca. — FD. (Instruistaj aferej): G. Lascombe, 1, Rue Bugeaud.
Polujo.
Wilno. — D: S. Szyk, Zawalna 58.
Svislando.
Nd. Gerlafingen (Solothurn). — D: F. Walther-Born, « Friedheim ».
Usono.
Cleveland (Ohio). — D: L. D. Stern, 2995, Lincoln Boulevard.

NOTO.

En nia Oficiala Bulteno N-ro 4 kaj en « Heroldo » N-ro 43 aperis la sekvanta eraro en la listo de Kotizoj 1938:
 Polujo, MA - 125 zlotoj. Devas esti: 12.5 zl.

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ — 310.
 Ni ree atentigas, ke la kotizo restas £ 1 nur ĝis la fino de la nuna jaro.
 C. C. GOLDSMITH,
 Ĝenerala Sekretario.

Kotizoj de IEL 1938

MEMBRO KUN JARLIBRO (M.J.) ricevas membrokarton, servokuponaron kaj la Jarlibron.

MEMBRO-ABONANTO (M.A.) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton dum la jaro.

MEMBRO-ABONANTO-HEROLDO (M.A.H.) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la semajnan gazeton « Heroldo de Esperanto » dum la jaro.

MEMBRO-SUBTENANTO (M.S.) ricevas membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton; krom tio li rajtas ricevi premion el la listo.

Noto: La oficialaj gazetoj estas **Esperanto Internacia** monate, kaj **Heroldo de Esperanto** semajne.

En la landoj, kies Landa Asocio aliĝis al I.E.L., estas alpagota la respektiva kotizo de la Landa Organizo.

Oni povas pagi kotizojn al Loka Delegito de IEL, al la Ĉef-Delegito, al Landa Asocio, se tiu aliĝis al IEL, aŭ al la Centra Oficejo, Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

LANDO	MONO	MJ	MA	MAH	MS	Entrepreno	Jarlibro 1-paĝa anonco
Argentino	pesoj	3	7.5	15	20	7.5	30
Aŭstralio	ŝilingoj	4	10	19	25	10	40
Aŭstrujo	ŝilingoj	4	10	24	35	10	40
Belgujo	frankoj	20	50	128	175	50	200
Brazilo	milrejsoj	12	35	76	100	35	120
* Britujo	ŝilingoj	9	15	24	30	10	40
Bulgarujo	levoj	80	200	440	600	200	800
Ĉeĥoslovakujo	kronoj	20	50	128	150	50	200
Ĉilio	pesoj	25	65	125	180	65	250
Ĉinujo	dolaroj	3	8	16	20	8	32
Danujo	kronoj	4	10	20	25	10	40
Estonujo	kronoj	2.5	6.5	17.5	20	6.5	25
Finnlando	markoj	40	100	210	250	100	400
* Francujo (Ĝ Kolonioj).	frankoj	20	55	135	200	55	220
Grekujo	drakmoj	100	250	520	700	250	1000
Hungarujo	pengoj	4	10	24	30	10	40
Italujo	liroj	15	40	91	120	40	160
Japanujo	jenoj	2.5	6	16	20	6	25
Jugoslavujo	dinaroj	30	100	200	250	100	400
Kanado	dolaroj	1	2.5	5	6	2.5	10
Kubo	dolaroj	1	2.5	5	6	2.5	10
Latvujo	latoj	4	10	24	30	10	40
Litovujo	lidoj	6	15	30	42	15	60
Nederlando	guldenoj	2	4	8.8	10	4	40
Norvegujo	kronoj	4	10	19	25	10	40
Nov-Zelando	ŝilingoj	4	10	19	25	10	40
Polujo	zlotoj	5	12.5	25	30	12.5	50
Portugalujo	eskudoj	15	40	103	125	40	160
Rumanujo	leoj	100	250	660	800	250	1000
Svedujo	kronoj	4	10	19	25	10	40
Svisujo	frankoj	4	10	20	25	10	40
Turkujo	piastroj	100	300	600	750	200	1200
Urugvajo	pesoj	1.5	3.5	6.5	10	3.5	14
Usono	dolaroj	1	2.5	5	6	2.5	10

* indikas ke la kotizo enhavas ankaŭ la kotizon de la Landa Asocio.

- D. **La homaj Rasoj de la Mondo**, R. Nordenstreng; **Juneco kaj Amo**, E. S. Payson; **Kompatinda Klem**, John Merchant; **Por Recenzo**, K. R. C. Sturmer. Ĉiuj originalaj verkoj, kaj tole binditaj.
- E. **Romano pri Afrika Bieno**, de Olive Schreiner; **Pri la Origino de l'Homo**, Sir A. Keith; **Miniaturoj**, poemoj de G. Nash. Ĉiuj tole binditaj.
- F. **La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo**, Charles Dickens. Belega luksa eldono, kaj krome, **Progresado kaj la Pasinteco**, G.F. Wates (William Bailey).
- G. **Gösta Berling**, Selma Lagerlöf; **Bela Joe**, Marshall Saunders. Ambaŭ binditaj.
- H. **Tra Sovaga Kamĉatko**. Sten Bergman; **Stranga Heredajo**, Luyken. Ambaŭ binditaj.
- I. **Sveda Antologio**, Redaktita de Sam Jansson. 432 paĝoj, luksa papero, bindita.
- J. **Ĉeĥoslovaka Antologio**, O. Ginz kaj S. Kamaryt. Broŝurita ekzemplero.
- K. **Hungara Antologio**, K. Kalocsay. Broŝurita ekzemplero.
- L. **Romo kaj Ĉirkaŭaĵoj** (bind.); **Vivo de Zamenhof**, Ed. Privat (bind.).
- M. **Jane Eyre**, C. Brönte; **Lilio**, Sinnotte, kaj **La Karavano**, Hauff. Ĉiuj tri libroj bind.
- N. **La Leono de Flandrujo**, H. Conscience (bind.); **Rumana Bonhumoro**, Firu kaj Pragano.
- O. **Oduseias de Homerus**, W. J. A. Manders (bind.); **Ok Noveloj**, Arnold Bennett; **Facila Legolibro**, K.R.C. Sturmer.
- P. **Pallieter**, F. Timmermans (bind.); **Bela Joe**, Marshall Saunders (bind.); **Ok Noveloj**, Arnold Bennett.
- Q. **Romano de San Michele**, Axel Munthe (bind.); **Tri Angloj Alilande**, J. Merchant.
- R. **La Amo en la Jaro Dekmil**, El C. Ignotus (bind.); **Du Mastro-Noveloj**, Storm; **Komuna Kantlibro**, Holmes.
- T. **Vagabondo kaj Sinjorino**, Kloeffer (bind.); **Vivo de Zamenhof**, Ed. Privat (bind.); **Pri la Origino de l'Homo**, Sir A. Keith (broŝ.).
- U. **Jarmiloj Pasas** (mondhistorio) Haefker. En unu volumo, broŝurita.

Ni funebras

— S-ino AVIS ELLEN SMITH, mortis la 6.11. 1937, 74-jara. Ŝi estis la edzino de s-ro A. E. Smith, multjara laborinto por la movado en Anglujo, kaj IEL-Delegito en Kettering. Niajn sincerajn kondolencojn al nia samideano kaj la familio!

— S-ro C. H. NIELD en Bognor, Britujo, mortis la 25.9.1937. Li estis fervora esperantisto dum multaj jaroj. Li ripozu pace!

Portugala esperantisto D-ro Carlos Santos, eminenta radiologo, eltrovis aparaton por stereoradiografio

D-ro Carlos Santos prezentis al la Konferenco de la Unuiĝo Internacia kontraŭ la Tuberkulozo, kiu kunvenis somere en Lisboa, aparaton de li eltrovitan, kiu plifaciligas la stereoradiografion de la brusto. La eltrovo de tiu sciencisto estas apliko de la pendola movo por la rapida anstataŭigo de la radiografiaj plakoj.

D-ro Carlos Santos, pro sia multlingveco, estis nomata sekretario de tiu konferenco; ankaŭ li estas esperantisto, kiu ne hontas, sin konfesi tia. Antaŭ nelonge li faris paroladon pri Esperanto ĉe Rotari-klubo, kies influa membro li estas.

Tial Heroldo de Esperanto kaj la portugala esperantistaro tre gratulas kaj dankas lin.

I. B. A.

Listo de premioj por Membro-Subtenanto, 1938

- Ĉiu MS rajtas elekti unu el la sekvantaj premioj, mendotaj la la koncerna litero.
- A. **Heroldo de Esperanto** dum unu jaro. Tio signifas, ke MS kiu elektas tiun premion ricevos la gazeton «Esperanto Internacia» monate, kaj «Heroldo de Esperanto», semajne.
- B. **TRI** volumoj el la sekvanta listo.
 1. **La Viro el Francujo**. Ivans. (W. Versteeg Graftdijk)
 2. **Quo Vadis?** (Vol. I.) H. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof)
 3. **Quo Vadis?** (Vol. II.) . Sienkiewicz (Lidja Zamenhof)
 4. **Ŝi**. Rider Haggard (G. J. Degenkamp)
 5. **Fanny**. Edna Ferber (Berno Fabo)
 6. **Riĉa kaj Sen Mono**. E.P. Oppenheim (F. E. Wadham)
 7. **La Ora Ŝtuparo**. E. P. Oppenheim (Romford Esp. Societo)
 8. **Luno de Izrael**. Rider Haggard (Payson kaj Butler)
 9. **Pinokjo**. C. Collodi (M. Marchesi)
 10. **La Dormanto Vekiĝas**. H.G. Wells. (A.F. Milward)
 11. **Petrolo**. (Vol. I.). Upton Sinclair (W. Bailey)
 12. **Petrolo** (Vol. II.). Upton Sinclair (W. Bailey)
 13. **La Aventuroj de Marteno Drake**. G. Norway (W. Severn)
 14. **La Naiveco de Pastro Brown**. G. K. Chesterton (D-ro Cecil Bean)
 15. **Vivo de Zamenhof**. D-ro Ed. Privat.
 16. **Progresado kaj la Pasinteco**. G. F. Wates (William Bailey)
- Ĉiu volumo estas tole-bindita. Indiki la elekton laŭ la jena maniero: B 1-4-7.
- C. **Hindo rigardas Svedlandon**. Bind. **Sivaĝi, Bengalaj Fabeloj, Kaj ĉio restas penso sed ne faro**. Ĉiuj kvar libroj originale verkitaj de L. Sinha.

Du pioniroj jubileas

Prof. D-ro Odo Bujwid 80-jara

La tutmonda esperantistaro kaj la sciencaj rondoj en Polujo kaj eksterlande festos la 30-an de novembro nunjare la 80-an naskiĝtagon de la konata pioniro kaj batalanto de la lingvo internacia kaj fama pola scienculo Prof. D-ro Odo Bujwid.

Malmultaj estas nun la personoj, kiuj sukcesis kunligi la profundan sciencan kun junulaj entuziasmo, ideoj kaj aspiroj; malofte oni povas renkonti homon, kiu tiom impresis siajn proksimulojn.

Prof. D-ro Odo Bujwid naskiĝis la 30-an de novembro 1857 en Vilno. Li studis en Varsovio, kie li finis gimnazion kaj medicinan fakultaton. 24-aĝa, li jam famiĝis dank' al sciencaj laboroj: « Hemio de homa salivo » kaj « Mikroskopaj esploroj de la Salivo ».

En 1885 li revenis el Berlino de kurso ĉe Prof. Rob. Koch kaj fondis la unuan en Polujo bakteriologian laboratorion en sia privata loĝejo. Dezirante konatigi kun la metodo de kontraŭrabia vakcinado, trovita de Pasteur, Prof. Bujwid forveturis Parizon, kie li ĝin elprovis je si mem. Post la laborado en Parizo sub la persona gvido de Pasteur, kiu kun Prof. Bujwid dum multaj jaroj estis en amikaj rilatoj, li revenis Varsovion kunprenite la du kuniklojn, inokulitajn en la Pasteur-laboratorio. En 1886 Prof. Bujwid komencis apliki la unuajn (en Polujo kaj ekster Francujo) vakcinadojn kontraŭ rabio.

En la sama tempo li fondis en Varsovio la Urban Instituton por bakteriologia esplorado de manĝartikloj kaj enkondukis bakteriologian kontrolon de Varsovia akvo.

En 1893 Prof. Bujwid ricevis katedron de higieno en la Krakova Universitato, samtempe gvidante la Instituton en Varsovio. Li prelegis en la Universitato ĝis la jaro 1916 dum tempo oficante kiel dekanon de la medicina fakultato.

Pro siaj multaj sciencaj laboraĵoj (pli ol 250!) kaj grandaj meritoj Prof. Bujwid ricevis multajn polajn kaj eksterlandajn ordenojn. Ankaŭ li laboris kaj laboras multe ĉe diversaj sociaj aranĝoj.

Estante ankoraŭ studento, Prof. Bujwid konatiĝis kun D-ro L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, sed fervora adeptulo de lia kreitaĵo li fariĝis ekde la Universala kongreso de Esperanto en Krakovo en la jaro 1912. De tiu tempo, malgraŭ la scienca laborado, Prof. Bujwid tre ageme partoprenas en la Esperanta movado. Ĉiam senlaca kaj energia, li

reprezentas la pollandan Esperantan movadon ĉe ĉiuj Universalaj Kongresoj, partoprenas la landajn kunvenojn kaj konferencojn, prezidas Pollandan Esperanto-Delegitaron, prelegas per radio, intervenas en ministerioj ktp. Prof. Bujwid kunlaboras ankaŭ en multaj internaciaj esperantistaj organizaĵoj. En 1927, havante 70 jarojn, li dufoje ensemajne alvenis el Krakovo Varsovion por prelegi pri Esperanto en la loka Universitato.

En la jaro 1930 Prof. Bujwid vojaĝis tra Danujo kaj Nederlando, prelegante tie en Esperanto pri Polujo.

En la kuranta jaro la duan fojon li veturis Brazilon, ankaŭ tie prelegante pri Esperanto. Li prezidis la Universalajn Kongresojn en Krakovo 1931 kaj en Varsovio 1937.

Prof. D-ro Odo Bujwid konscias la grandecon de la Esperanta ideo, por kiu li ne ĉesas labori malgraŭ sia maljuna aĝo. Por la tuta esperantistaro li jam ne estas nur unu el la ĉefaj kaj reprezentaj personoj de nia movado, sed fariĝis viva simbolo de persistema laborado kaj profunda sindediĉo por la kara afero.

Kaj kiam nun ankaŭ en Polujo certaj medioj celas enkonduki la «rasteoriojn», Prof. Bujwid ne povis silenti. Kune kun aliaj multaj kleraj poloj li kondamnis ilin kiel nedecajn al la kulturo kaj progreso.

Tial la 80-jara naskiĝtago de Prof. D-ro Odo Bujwid devas esti festo por ĉiuj, ŝatantaj liberecon kaj sciencan, batalantaj por la pli bona morgaŭo.

I. Dratwer.

*
**

Harald Thilander 60-jara

Unu el la plej ĝojigaj sciĝoj el la Jubilea Kongreso estis tiu, kiu informis pri la distingo de Harald Thilander per la plej alta pola ordeno « Polonia Restituta ». Se iu inter la esperantistaro meritis tiel altan dekoracion, vere ne ekzistas pli inda ol nia granda sveda pioniro.

Kiu estas Harald Thilander? Ĉu necesas prezenti lin al la tutmonda samideanaro? Oni povus pensi ke tio estas superflua, ĉar ĉiu ja devas lin koni, lin kaj lian grandan vivlaboron. Ĉu ĉiu lin konas? Bedaŭrinde ne! Parolinte al kelkaj, mi konstatis ke apenaŭ lian nomon ili aŭdis. Oni ne kredus; sed ĉar ĝi estas fakto, tiun fakton supozeble kaŭzis unuflanke la neimagebla modesteco de Thilander, kaj aliflanke lia laboro sur speciala kampo, pri kiu ne ĉiam estas sufiĉe informita la cetera esperantistaro.

Harald Thilander estas la granda bonfaranto de la blinduloj-esperantistoj!

Li mem en sia frua junaĝo, post grava malsano-skarlatino, fariĝis blinda, kaj krome preskaŭ surda, kaj kripla. Neniu tiam supozis ke tiu malforta, malsanema, blinda, surda kaj kripla knabo iam povos fariĝi eĉ en modesta grado utila membro de la homa socio.

Sed en tiu malsan-detruita korpo ekzistis fortega animo. La blinda kriplulo ne volis esti ŝarĝo por la socio, li ne volis resti nenionfaranto, li volis lerni, multe lerni, — kaj utili.

Tial, kiam li pliaĝiĝis, li komencis per eksterordinara energio kaj persistado lerni lingvojn: unue france, poste ankoraŭ angle kaj germane. Sed li — la duonsurdulo — devis mem laŭ diktado kopia la gramatikajn librojn.

En 1901 li konatiĝis kun Esperanto. Tio estis por li kvazaŭ revelacio. Jen la rimedo por plej okulfrape helpi siajn blindajn samsortanojn en la tuta mondo! —

Kion ankoraŭ aldoni?

Ĉiu, espereble, konas la monatan revuon « Esperanta Ligilo », eldonata en Brajla (punkt-) preso, fondita en 1904 de la granda blindulamiko Th. Cart, kaj en 1912 transprenita de Thilander kaj de tiam ankaŭ presata de li. En ĵus eldonita adresaro troviĝas 1624 nomoj de blindaj samideanoj en 38 landoj, kies esperantistiĝo estas ĉefe lia merito.

Harald Thilander feliĉe trovis ankaŭ la ĝustan por li vivikamaradon. Lia unua edzino, Karin Höjer, mortis tro frue antaŭ dek jaroj. Poste edziniĝis al li finna esperantistino kaj blinda poetino Varma Järvepää, kiu ĝis nun estas lia fidela kunulino kaj helpantino.

Nun li — la 25-an de oktobro — fariĝis 60-jara. La tuta esperantistaro kore gratulas la altaniman jubileulon, kies vivoverko estas vere grandioza. Ĉar — kaj tion nur malmultaj inter la esperantistoj scias — Harald Thilander eldonas ne nur la monatan revuon por la esperantistaj blinduloj sed jam de 1909 li estas ankaŭ redaktoro kaj eldonanto de ĉiusemajna porblindula revuo naci-lingva.

Subskribinto havis unufoje, antaŭ multaj jaroj, kiam ankoraŭ la karmemora Karin Höjer vivis, la okazon viziti la geedzojn Thilander kaj babili iom kun ili pri gravaj kaj bagatelaj aferoj. De tiu tempo mi ne plu forgesas la simpatian amikon, kiu malgraŭ sia kripleco tiom multe faris dum sia ĝisnuna vivo kaj kiu tamen estas tiom altgrade modesta. Mi deziras al li ankoraŭ multajn jarojn en freŝeco kaj vicleco.

T. J.

Lidja Zamenhof en Usono

La Esperanto-movado de Usono kaj speciale tiu de Nov-Jorko nun spertas gravan periodon de sia historio, ĉar Lidja Zamenhof, invitita de la Nacia Spirita Konsilantaro de la Bahaanoj, vizitas la « Novan Mondon ».

Ŝi alvenis per la pola sipo « Batory » en Nov-Jorko, la 30-an de septembro. Grupeto da esperantistoj kaj bahaanoj bonvenigis ŝin ĉe la ŝipejo — malgranda nur estis tiu grupeto, ĉar estis labortago. Kune ili iris al la hotelo «New Yorker»; tie kelkaj ĵurnalistoj dum longa tempo intervjuis la gastinon kaj montris grandan intereson pri la Esperantismo. Du el la plej gravaj taggazetoj raportis pri la okazaĵo; inter ili estas la plej disvastigita, la *News* (eldonkvanto 3.000.000).

Interkonatiga kunveno

okazis la 2-an de oktobro en la domo de la loka bahaana grupo, kies estraro aranĝis te-trinkadon. La salono estis tute plena, kaj ĉiu penis paroli kun f-ino Zamenhof dum kelka tempo. S-ro Mountfort Mills, la estro de la Nacia Spirita Konsilantaro, bonvenigis Lidja'n Zamenhof en la angla lingvo; s-ino Della C. Quinlan en Esperanto, nome de la invita komitato.

Surprizo venis, kiam Lidja Zamenhof respondis per ĉarma kaj inspiriga parolado en la angla lingvo, kaj entuziasma estis la aplaŭdo kiu sekvis.

Sekvis komuna vespermanĝo en la hotelo « New Yorker », kie proksimume 50 personoj ĉeestis. Post tio la Nov-Jorka Esperanto-Societo invitis ĉiujn al sia kunveno, en la sama hotelo. Tiu kunveno estis ĉefe dediĉita al

Probleco de Cseh-kurso

kiun gvidis Lidja Zamenhof.

Plenplena estis la malgranda salono; pli ol 100 personoj ĉeestis ĉe la komenco, kaj la alfluo ne ĉesis. En vigla, sprita maniero f-ino Zamenhof kondukis la lecionon; ne mirinda estas la sukceso, kiun ŝi jam havis en Francujo.

Sendube ankaŭ tie ĉi ŝin atendas sukceso. Dum tri monatoj Lidja Zamenhof kursgvidos en Nov-Jorko kaj, se eble, ankaŭ en aliaj lokoj. La 10-an de oktobro jam estis 47 kursanoj. Se oni konsideras la malfacilaĵojn, kiujn la Esperanto-movado spertas en ĉi tiu granda urbo, tiu rezulto jam estas kontentiga. Sed la nombro certe ankoraŭ kreskos.

La 17-an de oktobro f-ino Zamenhof parolis en la bahaana kunveno pri « La Reveno de Spirita Heroeco ». Multaj bahaanoj, kiuj ĝis nun ne okupiĝis pri la mondlingvo, komencis la studadon de Esperanto.

Novan esperon vekis Lidja Zamenhof en niaj koroj, kaj verdan fajron en la koroj de multaj ĝis nun indiferentaj. Benata estu ŝia malfacila laboro!

N-Y-anoj.

Esperantista Lingva Komitato Akademio

Oficialaj sciigoj de la Akademio.

(N-ro 13 — Oktobro 1937)

1. Elekto de membroj de la Lingva Komitato.

La membroj de la LK, elirantaj en 1937 pro finiĝo de sia naŭjara periodo de aneco, estas reelektitaj. Ili estas: S-roj BAGHY, BELMONT, BOFILL, DREZEN, GHEZZO, MUĈNIK kaj UITTERDIJK.

2. Elekto de membroj de la Akademio.

Kiel membroj de la Akademio estas elektitaj: S-roj BAGHY, BELMONT kaj CSEH, elirantaj pro finiĝo de sia naŭjara periodo kaj S-roj GRAU CASAS, MINOR, SCHMID kaj WARINGHIEN, kandidatoj, prezentitaj la 1-an de Julio 1936.

3. Elekto de la Estraro de la Lingva Komitato.

Laŭstatute okazis la ĉiutrigara baloto por la elekto de la Estraro de la LK. Voĉdonis 11 Akademianoj.

Por la posteno de Prezidanto ricevis: S-ro ROLLET DE L'ISLE 4 voĉojn, S-ro ISBRUCKER 4 voĉojn, S-ro BAILEY 1 voĉon kaj S-ro BELMONT 1 voĉon. Unu voĉo estis blanka.

Ĉar S-ro ROLLET DE L'ISLE oficiale sciigis, antaŭ la baloto, ke li rezignas la prezidantecon, li ne estis elektable; ĉar aliflanke S-ro ISBRUCKER, antaŭ ol akcepti la prezidantecon, esprimis la deziron, ke la plimulto el liaj kolegoj aprobu lian elekton, la Akademianoj estis ree konsultataj. 11 respondis, el kiuj 10 aprobis. Sekve S-ro ISBRUCKER estas elektita Prezidanto.

Por la postenoj de Vicprezidanto ricevis: S-ro BAGHY 3 voĉojn, S-ro GRAU CASAS 3 voĉojn, S-ro BASTIEN 2 voĉojn, S-ro ISBRUCKER 2 voĉojn, S-ro WARINGHIEN 2 voĉojn, S-ro CSEH 1 voĉon kaj S-ro ROLLET DE L'ISLE 1 voĉon.

Sekve estas elektitaj Vicprezidantoj S-roj BAGHY kaj GRAU CASAS.

Por la posteno de Direktoro de la Sekcio « Komuna Vortaro » ricevis: S-ro W. BAILEY 8 voĉojn, S-ro SCHMID 1 voĉon kaj S-ro WARINGHIEN 1 voĉon.

Sekve S-ro BAILEY estas elektita.

Por la posteno de Direktoro de la Sekcio « Gramatiko » ricevis: S-ro CSEH 2 voĉojn, S-ro WARINGHIEN 2 voĉojn kaj S-roj BAGHY, LIPPMANN, SCHMID kaj STAMATIADIS ĉiu 1 voĉon.

Sekve, ĉar S-ro CSEH estas pli malnova Akademiano ol S-ro WARINGHIEN, li estas elektita provizora Direktoro, ĝis D-ro LIPPMANN povos reokupi sian postenon.

Por la posteno de Direktoro de la Sekcio « Teknikaj Vortaroj » ricevis: S-ro HELLEBOID 4 voĉojn, S-ro SETALA 2 voĉojn kaj S-roj GRENKAMP, INGLADA, ISBRUCKER kaj MINOR ĉiu 1 voĉon.

Sekve S-ro HELLEBOID, sekretario de la « Pariza Studa Komisiono por Teknika Vortaro », estas elektita.

Por la posteno de Direktoro de la Sekcio « Kontrolo » ricevis S-ro ROLLET DE L'ISLE 9 voĉojn; sekve li estas elektita.

4. Estontaj elektoj.

Pro decido de la LK, ke devas esti intertempo de 6 monatoj inter la prezentado de kandidatoj kaj la baloto, nun estas prezentataj la sekvantaj membroj, kies naŭjara periodo finiĝos en 1938: F-ino SHAFER kaj S-roj Th. G. BAILEY, DEMIDJUK, ESSELIN, HOHLOV,

KUHNEL, NEKRASOV, PRIVAT, RUBLOV, SPIDROVIĈ, STOJAN kaj WIESENFELD.

Ankaŭ pro decido de la LK, ke la nombro de ĝiaj membroj ne superu 100 kaj ĉar ĝi nun estas 107, neniu nova kandidato estas prezentata.

5. Kunsido de la Lingva Komitato kaj la Akademio dum la Kongreso en Varsovio.

La 12-an de Aŭgusto 1937 okazis en Varsovio kunveno de la LK kaj de ĝia Akademio. Ĉeestis 4 Akademianoj kaj 8 membroj de la LK.

6. Diversaj informoj.

Transprenante la funkcion de Prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Akademio el la manoj de mia antaŭulo, S-ro ROLLET DE L'ISLE, mi ne volas preterlasi la okazon esprimi al li tutkoran dankon pro ĉiuj laboroj kaj klopodoj, kiujn li faris en la intereso de niaj Lingvaj Institutioj. Ni ĝojas, ke S-ro ROLLET DE L'ISLE daŭrigas okupi sian postenon de Akademiano kaj restas preta kiel Direktoro de la Sekcio « Kontrolo » ankaŭ estonte dediĉi siajn fortojn al la laboroj de la Akademio.

Dum multaj jaroj S-ro DE LAJARTE fervore kaj diligente plenumis la taskojn de Sekretario de la LK de la Akademio. Ankaŭ al li ni ŝuldas sinceran dankon pro liaj multaj zorgoj kaj laboroj sur tiu posteno. Kvankam ankaŭ por la estonto S-ro DE LAJARTE disponigis siajn valorajn konsilojn kaj helpojn por la funkciigo de la Akademia laboro, la distanco inter lia loĝloko kaj mia, kiu fakte malebligas buŝan intertrakton, estus ia malhelpo por facila kaj rapida plenumo de la konstantaj sekretariaj taskoj. Aliflanke, la INTERNACIA CSEH-INSTITUTO DE ESPERANTO, esprimante la deziron efike apogi la laborojn de niaj Lingvaj Institutioj, deklaris sin preta, preni sur sin la multobligon — eĉ senpage — de ĉiuj cirkuleroj, sendotaj de la Prezidanto kaj do fakte funkcii kiel sekretariejo de la Akademio. Tiun proponon mi volonte akceptis kaj mi do tie ĉi volas esprimi koran dankon al la Instituto pro tiu valora subteno.

Direktante la rigardon al la estonto kaj al la laboro, kiu atendas nin, mi volas alvoki al serioza kaj diligenta kunlaboro ĉiujn miajn kolegojn Akademianojn kaj Lingva-Komitatanojn kaj ĉiujn aliajn, kiuj bonvolos dediĉi siajn fortojn al lingvaj studoj, rilataj al Esperanto. Jam en nia kunveno dum la Kongreso en Varsovio ni preparolis komencotan laboron por la starigo de oficiala listo de la radikoj de Esperanto kun iliaj difinoj en Esperanto. Pri tiuj laboroj, en kiuj ĉiuj spertaj Esperantistoj povos partopreni, pli detalaj informoj aperos post nelonge.

La Akademio havas la gravan taskon observi kaj gvidi la evoluon de la lingvo Esperanto kaj tial estas necese, ke ĝi restu en daŭra kontakto kun ĉio, kio aperas en nia lingvo. Bedaŭrinde la tre modestaj financaj rimedoj, pri kiuj la Akademio disponas, ne ebligas al ĝi la fondon de vasta biblioteko kaj tial mi volas ripeti alvokon jam antaŭe faritan al Esperantaj eldónistoj: bonvolu sendi al mi ekzempleron de ĉiu libro kaj de ĉiu gazeto, ĉiu vi eldonas; se vi aperigas gravajn verkojn en Esperanto, kiuj estos valoraj kontribuoj al la Esperanta literaturo, mi kuraĝas eĉ peti, ke vi sendu unu ekzempleron al ĉiuj Akademianoj, kies nombro ja ne estas granda. Nur tiel la Akademio povas resti daŭre informita pri nia kreskanta kaj floranta literaturo, kiu reprezentas unu el la plej gravaj formoj de la vivo de nia tuta movado.

Ir. J.R.G. Isbrücker, Prezidanto.

Mallongaj Informoj

I. H. Krestanov prelegis en Skandinavio.

Post sukcesa prelegserio en la baltikaj landoj kaj Finnlando, ankaŭ la dua etapo de la vojaĝo de s-ro Krestanov okazis glate kvazaŭ sur reĝoj, dank' al la fakto, ke li paroladas senpage, kaj dank' al la morala helpo de la bulgaraj ĉefkonsuloj, de Sveda Esp.-Federacio kaj Norvega Esp.-Ligo. Li faris sukcesajn paroladojn pri «Bulgarujo, lando de la rozoj kaj centjaruloj» en Stockholm (2), Upsala, Örebro, Karlskoga, Göteborg, Halmstad, Hässleholm, Malmö, Lund, Helsingborg, Oslo, Kongsberg, Kristiansand, Stavanger, Haugesund, Bergen, Hamar, Brumunddal, Trondheim k.a. La gazetaro plej favore raportis, donante longajn intervjuojn kaj publikigante la portreton de s-ro Krestanov kaj karakterizajn bildojn el lia patrolando. — Nun s-ro Krestanov vojaĝas tra Danujo, la lando de Andersen kaj Hamleto. Poste li vizitos Islandon.

Varsovia LKK ĝustigas falsraportojn.

Ĉar en kelkaj esperantaj kaj naciaj gazetoj aperis malĝusta informo, ke dum la Universala Kongreso en Varsovio ne estis reprezentita la Registaro de Polujo, ni opinias necese komuniki, ke la Ŝtatsprezidanton reprezentis dum la Solena Malfermo de la Kongreso s-ro Piestrzynski, vicministro de Socia Prizorgo, Ministerio de Eksterlandaj Aferoj reprezentis s-ro D-ro Rygiel, kiu kiel oficiala delegito kaj observanto de la Ministerio partoprenis ne nur la Solenan Malfermon, sed kunsidojn de TA-GE, TEKA, ISAE kaj aliajn. Cetere en la tago de la Malfermo de la Kongreso ĉiuj ministroj estis en Krakovo, kie okazis grava nacia solenaĵo. Ankaŭ ni notu, ke salutis la Kongreson per letero s-ro Rose, vicministro de Komercio kaj Industrio.

Ankaŭ ni devas protesti kontraŭ multaj aliaj malveraĵoj, aperintaj en kelkaj, precipe dekstratendencaj gazetoj.

LKK de la 29-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio.

(Represo petata.)

Abstinaj esperantistoj en la Jubilea Kongreso.

Dum la 50-jara jubilea kongreso de Esperanto okazis en Varsovio i.a. la kunveno de abstinaj esperantistoj. Ĝin prezidis staciestro H. Salokannel el Finnlando, eksĉefdeputito de la finnaj bontemplanoj, legante raporton pri la situacio en sia lando. Sinjorino Lila Tazbirowa el Varsovio (adr. Hoza 74) raportis pri Polujo, poste sekvis la interesaj raportoj el Svedujo, Ameriko, Aŭstralio, Arabio ktp. S-ino Tazbirowa iniciatis la starigon de « Internacia informoficejo de abstinaj esperantistoj ». Oni tuj elektis ŝin kiel prezidantino de tiu grava oficejo. Bontemplanoj kaj aliaj abstinuloj estas insiste petataj sendi fidindajn informojn tiurilatajn al la dirita adreso.

Esperanto kaj kristanismo.

La 14.-19.9. estis en Budapeŝt landa konferenco de Kristana Evangelia Federacio kun partopreno de Tutmonda Evangelia Alianco. La kunsidoj, preĝhoroj, predikoj okazis en la Muzikakademio. La 18-an vespere en la granda ĉambrego antaŭ proksimume 600 personoj oni laŭtlegis salutleteron en nomo de Kristana Esperanto-Ligo kaj oni deklaris, ke la Federacio invitas la hungaran sekcion de la Ligo partopreni en la konsilantaro de la Federacio, kiel ties subsekcio. En la Federacio partoprenas ĉiuj hungaraj protestantaj eklezioj, Savarmeo, libera kristana eklezio, kuracista rondo, poŝtista, fervojista, veturila, ktp. misioj. Adreso: D-ro Sándor Ccia, Budapeŝt VI, Andrászi-ut. 83. Oni deziras la adresojn de eksterlandaj kristanoj, kiuj partoprenos en la laboro. — La 26.9. s-ro Balkányi parolis pri Esperanto dum tevespero de reformita eklezio antaŭ 150 personoj.

35-jara Jubileo de Bruĝa Grupo Esperantista brile sukcesis.



Antaŭ nelonge, la Reĝa Societo « Bruĝa Grupo Esperantista » en Brugge (Bruges), Belgujo, festis sian 35-jaran jubileon. Jen la oficiala fotografaĵo de la partoprenantoj antaŭ la Provinca Palaco.




Kelkaj partoprenantoj je la jubileaj festoj de Reĝa Societo « Bruĝa Grupo Esperantista » post la akcepto en la Urbdomo.

20-a Kongreso de IKUE (katolika kongreso) okazos en Ljubljana (Jugoslavio).

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) decidis okazigi sian 20-an mondkongreson la 23.-29.7.1938 en la konata jugoslava urbo Ljubljana. Tie sub prezido de s-ro Golobič funkcias kongresa komitato, kiu donas ĉiujn necesajn informojn. Aliĝkoto 50.— din. Adreso de la LKK, ĉe s-ro Damjan Vahen, Reslova 29, Ljubljana. Informoj pri la kongreso estos legeblaj ankaŭ en « Espero Katolika ». Informojn pri IKUE donas s-ro Aleš Berka, ĝen. sekretario kaj kasisto de IKUE, V Jirchářich 8, Brno, Ĉeĥoslovakio.

Kanada Esperantista Asocio jarkunvenis.

La jarkunveno de KEA okazis la 25.9. en Hamilton (Ontario). Laŭkute la membraro elektis la konsilantaron, kaj la konsilantaro nomis el si mem la oficantojn. S-ro Norman Todd, Hamilton, refariĝis prezidanto. Laŭ la raportoj, la grupo de Toronto metis esperantlingvajn librojn en la publika biblioteko kaj disvastigis informojn perradie; en Hamilton la grupo provizas instruiston por Esp.-klaso, direktota de la Laborista Eduka Asocio. Ĉina membro, nuntempe en Toronto, informis pri agemeco en Vancouver. — Ĉe la vesperkunveno oni laŭtlegis el la libro « Arĝenta Duopo » pri la jubileantoj Baghy kaj Kalocsay, kaj surprize troviĝis en la grupo la « lingva avo » de la « duopo »: S-ro J. J. Sussmuth, kiu nuntempe estas prezidanto de la Toronto grupo, kaj vicprezidanto de KEA. Li vivis en Budapeŝt kelktempe antaŭ tridek jaroj; tie li instruis s-anon A. de Marich, kiu laŭvice instruis Baghy kaj Kalocsay. Kiel malgranda estas Esperantujo! — Oni raportis pri « Gazeto de Esperanto » kaj fondiĝo de Tutamerika Esp. Komitato, kaj la asocio aprobis la elekton de s-ro E. J. Bengough, hon. prez., kiel komitatano por Kanado. — Oni priparolis la Varsovian kongreson, kaj espereble la asocio estos reprezentata en la Londona kongreso 1938.



Esperanta familio, Esperanta ĉevalo kaj Esperanta ekspozicio super la nordpolusa cirklo.

Sur la bildo, maldekstre, sin prezentas internacia familio esperantista: usona samideano Charles Chomette, Los Angeles, kaj lia belga edzino Germaine Van der Veken, kun infanoj Dianto ĉ. 5½-jara kaj Lilio ĉ. unu-jara. Ges-roj Chomette interkonatiĝis dum la Universala Kongreso en Antverpeno (1928); ili konservis Esperanton kiel sian hejman lingvon, kaj kiam naskiĝis infanoj, la gepatroj donis al ili esperantlingvaj nomojn de floroj. Dianto, la pli aĝa, jam bone parolas la lingvon; Lilio, kompreneble, estas ankoraŭ tro malgranda por tio. S-ro Chomette sendis al ni la ĉarman foton, leginte ke la Varsovia kongresanaro honoris la majstron, metante diantojn kaj liliojn sur lian tombon.

Dekstre malsupre vi vidas fieran ĉevalon, kiu — laŭ la propono de fervora samideano — ricevis la nomon « Espero ». Posedanto de la ĉevalo estas s-ro F. Verbree, Gooilandscheweg 8, Bussum (Nederlando). Prave « Espero » portas sian nomon, ĉar ĝi bonege saltas kaj jam akiris premiojn en konkursoj sufiĉe gravaj. S-ro Verbree ne estas esperantisto; sed por pruvi, ke la esperantistoj ŝatas ke Esperanto ankaŭ jam disvastiĝas en la « ĉevala mondo », estus ne senutile sendi al li salutkarton.

Dekstre supre la konata Cseh-instruisto Tiberio Morariu montras al vi per bastono la situon de la sveda fermineja urbo Kiruna, kie okazis Esperanto-ekspozicio kaj kie li helpis disvastigi nian lingvon, — super la nordpolusa cirklo.

Grava alvoko al ĉiuj esperantistoj

Ni petas la atenton de ĉiuj esperantistoj por jena grava afero, kiu tuŝas la interesojn de la tutmonda esperantistaro. Je la 27.4.1937. okazis en sekcio Beverwijk, Nederlando, propaganda kunveno, en kiu la vizitintoj kantis kelkajn kantojn, i.a., « La Espero », muziko de F. de Ménéil. Post kelkaj tagoj la sekcio ricevis leteron de la « Nederlanda Oficejo por protektado de Muzik- kaj Aŭtorrajtoj » (B.U.M.A.) per kiu ĝi postulis la sumon de 3 guldenoj kiel pagon por aŭtoraj rajtoj. Ĉar ni nenion sciis pri la ekzisto de tiuj aŭtoraj rajtoj por la kanto « La Espero », same ne BEA (Brita Esperanto-Asocio) kiu eldonas la kanton kaj ĉe kiu ni informpetis, ni turnis nin al la oficejo por pluraj informoj. Al tio la oficejo respondis, ke F. de Ménéil estis membro de S.A.C.E.M. (la franca organizo por protektado de aŭtoraj rajtoj) kaj sekve de tio « La Espero » estas t.n. protektata kanto en ĉiuj landoj, laŭ la konvencio de Bern. Se efektive « La Espero » estas t. n. protektata kanto kaj en ĉiuj landoj oni do rajtas postuli pagon por permuzika aŭ perkanta pre-

zentado, tiukaze simpla kantado en eĉ la plej estas malpermesita sen pago por aŭtoraj rajtoj.

Ĉar ni opinias tiun ĉi aferon tre grava por la tutmonda esperantistaro, ni decidis publikigi ĝin en la gazetaro kaj petas informi nin.

1. ĉu efektive ekzistas kontrakto kun S.A.C.E.M., per kiu ĝi rajtas postuli la pagon de aŭtoraj rajtoj por « La Espero »;

2. ĉu en aliaj landoj oni jam spertis malfacilaĵojn pro tio;

3. ĉu eventuale la heredintoj de F. de Ménéil povas nuligi tian kontrakton;

4. ĉu estas alia rimedo liberigi nin de kontrakto, kiu malfaciligas la propagandon por nia lingvo kaj sendube ne estas konforma al la ideo Zamenhofa?

Volonte ni ricevos informojn de ĉiu, kiu povos klarigi tiun ĉi aferon kaj kontribui al kontentiga solvo.

La estraro de Federacio de Laboristaj Esperantistoj:

Postbus W.6., Amsterdam-W, Nederlando.

Esperanto kaj instruado.

La propagando por nia movado nuntempe ofte okazas sub devizo: « Esperanto en la lernejoj ». Ni propagandas kaj parolas pri ĉi tiu temo al aŭtoritatuloj, sed antaŭ ĉio ni devos interesigi la instruistaron kaj la gepatrojn de la lernejoj, kiujn ni volas atingi. En la propagandaj kunvenoj oni ĉiam montru plej multan materialon, rilate al la lingvo-uzado per la junularo: kurso-libretoj, legolibroj, gazetoj kaj korespondadoj. Sed por akiri en tiaj kunvenoj plej grandan nombron da aŭskultantoj, oni devas apliki ion trege allogan por la publiko. La estraro de TAGE preparolis tion kaj opinias, ke granda kvanto da infandeseĝnaĵoj povos efiki kiel sufiĉe grava allogaĵo en kunvenoj, kien oni petas personojn, kiuj havas intereson por edukado kaj instruado. Tiamaniere ni pli bone kunvenigos ĝuste tiujn personojn, kiujn ni antaŭ ĉio bezonas por enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Por tiuj celoj TAGE kolektos nun infandeseĝnaĵojn, plej diverslandajn kaj mi petas al vi, karaj gekolegoj, vian afablan kunlaboron. Bv. vendi al mia adreso, antaŭ la unua de februaro 1938, sufiĉe grandan kvanton da infandeseĝnaĵoj. Indiku sur ĉiu folio la aĝon de la lernanto, kiu ĝin desegnis. Se vi opinias necese aldoni kelkajn rimarkojn, bv. tion fari sur aparta papero.

El la ricevita materialo mi faros specialan ekspozicion, kiun mi poste povos pruntedone sendi al ĉiu kolego aŭ propagandisto, kiu ĝin bezonas por « lerneja » kunveno. Sed pripensu, ke tia materialo nur povos esti valora, se ĝi estos plej varia, do nur se multaj kolegoj el multaj landoj helpos. Ĉu mi povos kalkuli je via kbunlaboro?

P. Korte, administranto de TAGE,
Schoolstraat, 13, Veendam (Nederland).

Studrondo por instruistinoj en Birmingham, Anglujo.

La 16.-17.10. okazis interesa pedagogia eksperimento. Ok instruistinoj en Birminghamaj Clent-montetoj por diskuti problemojn en la instruado de Esperanto. Pro la fakto ke ses el ili nuntempe instruas la lingvon en kvar lernejoj, la diskutado enhavis sufiĉe diversstapajn spertojn.

En la unua tago, ili pritraktis instrumentadojn; elekton de temoj kaj vortoj taŭgaj por infanoj; la bezonon por legmaterialo kiu atentos vortoftecon kaj ne tro rapide progresos gramatike; la organizon de korespondado; kaj eblajn aranĝojn por interlerneja agado. En la dua tago, ili studis japanan virinedukadon laŭ la broŝuro verkiita esperante de s-ro Nikkaŭa, kaj konstatis la altvaloron de tia prezentado.

Akompanis ilin du bonkoraj kaj spertaj amikinoj, kiuj alvenis ŝarĝitaj de manĝaĵoj kaj tiel bone mastrumadis ke la studrondanoj je ĉiu manĝo ekkriis por surprizo kaj kontento! Finfine, okazis aŭkcio, ĉar oni ne sukcesis malaperigi ĉiujn frandaĵojn, kaj post ridoplana konkurado, oni enkasigis monsumon kiu estas donacita al la kaso de la Jubilea Domo.

V. C. N.

La kontraŭuloj asertas

ke la esperantistoj estas frenezuloj ridindaj. Simile ili diris pri Edison, Zeppelin kaj la plej multaj ceteraj inventintoj. La postsekvinta tempo pravigis la « frenezulojn ». Same la estonteco pravigos nin. Tion sciante, ni, esperantistoj, pli ĝuste rajtas ridi pri tiuj ridinduloj kiuj volas ridindigi nin.

La kroataj vilaĝanoj parolas kaj uzas Esperanton !

Esperantaj societoj en malgrandaj vilaĝoj. --- Intervjuo kun la plej juna esperantisto. --- Opero de Smetana en Bregi. --- Aŭstraliaj semoj en kroata tero. --- Vilaĝoj pri kiuj vi ne aŭdis, sed kiuj scias pri vi.

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis unu leteron, kiu envere tre agrable surprizis min. Oni informis min, ke ĵus estas fondita nova vilaĝana esperantista societo en la kroata vilaĝo Virje (Jugoslavio). Ĝi invitas min veni kaj prelegi pri Esperanto al tieaj vilaĝanoj.

Sen troa pripensado mi decidiĝis kaj forveturis.

Kompreneble mi ne tro multe atendis! Mi pensis proksimume jene: « Certe en la tuta vilaĝo troviĝas unu-du personoj, kiuj ion aŭdis pri Esperanto kaj ellernis ĝin. Nun en sia granda entuziasmo ili fondis societon. Verŝajne ili entute ne estas veraj kamparanoj. Eble ili eĉ ne scias la lingvon. La letero, sendube, estis skribita en bona Esperanto, sed ĝin povis facile korekti iu esperantisto, okaze veninta en ilian vilaĝon. Nu, ni vidos! »

Kaj fakte mi vidis! Mi vidis tion, kion mi neniam esperis vidi! Koprivnica estas la lasta stacidomo en nia ŝtato. Ĝi troviĝas ĉe la limo inter Hungarujo kaj Jugoslavio. Tie mi elvagoniĝis por eniri alian trajnon, kiu kondukos min tra la fruktodona ĉedrava*) kamparo al Virje.

La vagono estas plenplena. Plejparte vilaĝanoj. Ili revenas al siaj hejmoj. Kun intereso mi aŭskultas ilian seriozan interparoladon pri iliaj laboro kaj zorgoj, pri ekonomio kaj la prezoj, sed ankaŭ pri la politiko. Mi tuj rimarkas ke ili juĝas la aferojn tre klare. Ni troviĝas en unu el plej kulturaj partoj de Kroatio.

La vagonaro haltas ĉiunmomente pro la multaj vilaĝoj, kiuj viciĝas unu post la alia. En Bregi eniras la vagonon unu alta kaj fortika kamparano. En la butontruo verdas nia stelo. En la manoj du grandaj kaj pezaj kofroj.

Mi alparolas lin kroate, ĉar mi timas, ke li ne scios bone esperanton kaj ke nia interparolado en la internacia lingvo povus finiĝi kun fiasko. Tio ja estus tre malbona el propaganda vidpunkto!

Sed li respondas al mi — en Esperanto. Post kelkaj frazoj mi kun agrabla surprizo rimarkas, ke li perfekte kaj flue uzas nian lingvon. La homoj en la vagono miregas. Verŝajne ili neniam aŭdis paroli unu vilaĝanon en fremda lingvo!

Mi demandas lin, ĉu la societo en Bregi estas forta. « Sufiĉe — li respondas —, ni havas ĉ. 30 membrojn-vilaĝanojn, kiuj bone parolas Esperanton. Ĝi estas la plej forta vilaĝana esperantista grupo en la ĉirkaŭaĵo. » Denove mi ekmiris! Ke en Bregi ekzistas societo, tion mi sciis, sed ke ĝi estas la plej forta, tio min mirigis. Signifas, do, ke ankaŭ en aliaj vilaĝoj troviĝas esperantistaj grupoj. Li daŭrigas rakonti: « Jes, ekzistas grupoj ankaŭ en Ĝelekovac, en Ĝurĝevac, en Peteranec, en Virje, kaj izolaj esperantistoj-vilaĝanoj troviĝas preskaŭ en ĉiu ĉedrava vilaĝo. Tiuj grupoj laŭnombro estas same fortaj kiel nia en Bregi, sed ili ne havas tiom bonajn esperantajn bibliotekojn, kiel ni. » Certe tiu biblioteko konsistas el 10-15 libroj — mi pensis, sed mi ne diris tion!

Mi dezirus scii, ĉu ĉiuj vilaĝanoj scias tiel bone la lingvon, kiel li: « Multaj — li modeste respondas — konas ĝin ankaŭ pli bone ol mi. Ili scias pli multajn vortojn! »

En agrabla kaj amika interparolado ni alveturis en Virje. Estis jam nokto, kaj mi baldaŭ enliĝis.

La morgaŭan matenon mi leviĝis sufiĉe frue. Estis bela aŭtuna vetero kaj mi deziris iomete promeni en la naturo. Irante tra la strato subite mi rimarkis verdan flageton sur la direkt-

ilo de biciklo, kiu venadis renkonte al mi. Estis samideano Kitoniĉ, bakisto el proksima vilaĝo Ĝurĝevac kun sia malgranda fileto Mladen, kiu ankoraŭ ne havas tri jarojn. Pri tiu saĝa knabeto, **kiu ĝis nun parolas nur Esperanton**, jam skribis Heroldo. Mi jam pli frue aŭdis pri li, sed apenaŭ nun mi havis la okazon konatiĝi kun li persone kaj konvinkiĝi, kiel bone li parolas la internacian lingvon. Mi tuj eluzas tiun ĉi okazon kaj mi intervjuas la plej junan esperantiston en Jugoslavio eble — eĉ verŝajne — en la tuta mondo. « Kiel vi nomiĝas? » mi demandas. Li iomete hontas, kaŝas sin post la patro kaj — ne respondas. « Nu respondu — diras la patro — ne hontu. La sinjoro deziras scii kiel vi nomiĝas. » Sed vane. Mladon silentas kaj ne respondas. Mi alproksimiĝas al li, prenas lin en la brakojn kaj komencas ludi kun li. Li rimarkas mian steleton. « Vidu, paĉjo — li diras — la stelo de la sinjolo estas pli malglanda ol la via. » Li ankoraŭ ne povas elparoli r. Nun ni jam estas bonaj amikoj.

« Ĉu vi havas fraton? » « Ne, li respondas, mi havas nul flatinon. Sed ŝi estas malglanda. » « Ĉu ŝi parolas Esperanton? » Li ridas. « Mi dilis, ke ŝi estas malglanda. Ŝi ankoraŭ ne povas paroli Esperanton. » Longe mi tiel parolis kun Mladen en Esperanto. Kaj mi estis profunde emociita...

La patro klarigas al mi: « Ankaŭ nia edzino parolas Esperanton. Ĝi estas nia familia lingvo. Ĝis nun Mladen konas nur Esperanton. Sed jam li komencis paroli kun siaj kamaradoj ankaŭ la kroatan lingvon. Tiel baldaŭ li scios du lingvojn: sian nacian kaj la internacian. »

Mladen, tiu eta, saĝa knabeto el unu kroata vilaĝo, ne rompas al si la kapon ĉu Esperanto estas arta aŭ ne, ĉu ĝi estas ebla aŭ ne. Li parolas ĝin, li ridas en ĝi, li ĝojas per ĝi. Kaj foje, kiam li estos pli aĝa, li ankaŭ scios eluzi kaj utiligi ĝin!

✱

En la granda kaj bela ĉambro de la vilaĝana kooperativo la klubo en Virje aranĝis ekspozicion de esperantaĵoj. Kiam mi eniris, denove atendis min tie agrabla surprizo. Sur la muroj pendis diversaj afiŝoj pri naciaj kaj internaciaj kongresoj. Dudeko da tabloj estis plenaj de libroj, gazetoj, revuoj, prospektoj ktp. Precipe mirigis min la multaj libroj. Preskaŭ ĉiuj plej bonaj verkoj el nia literaturo kuŝis tie. Ĉirkaŭ du cent diversaj gazetoj estis ekspoziciitaj. Sur unu tablo troviĝis nur esperantaj verkoj por blinduloj (en brajla skribo). Eĉ dekon da gramofondiskoj kun esperanta teksto mi vidis. Krom tio ankaŭ flagoj, flagetoj, korespondadoj, propagandaj surskriboj ktp. Ĉio ĉi montradis al la neesperantista publiko la valoron kaj signifon de Esperanto. Sed ĝi montris ankaŭ la tre altan kulturan nivelon de nia vilaĝano kaj ĝian grandan deziron al klerigo kaj progreso. Ĉar ĉio ekspoziciita estas proprajo de la kamparanoj kaj precipe de la klubo en Bregi. Kaj por aĉeti ĉion ĉi, oni devis multe, tre multe oferi, longe kaj persiste laboradi.

Mi, do, eraris: ne 10-15 librojn sed centojn da plej bonaj verkoj kaj broŝuroj posedas niaj ĉedravaj samideanoj-vilaĝanoj. Kaj la aliaj pli bonstataj, pli riĉaj kaj pli grandaj societoj en urboj??! Estus bone, se ili almenaŭ parte imituis iujn homojn el vilaĝoj! Estas superflue akcenti, ke tiu ekspozicio lasis bonegan impreson ĉe ĉiuj vizitintoj.

Vespere, post la prelego, estis amuzo. Alvenis ankaŭ samideanoj el pli proksimaj vilaĝoj. Precipe el Bregi kaj Ĝurĝevac. Ni ĉiuj sidis ĉe unu granda tablo kaj ni agrable babilas — kompreneble en Esperanto. La lingvo fluas. Ili

ĉiuj bonege parolas ĝin. Mi ekscias, ke ekzemple la klubo en Bregi havas ne nur gramofonon, sed ankaŭ radio-aparaton, kiun ĝi aĉetis antaŭ kelkaj jaroj por 6.000 dinaroj. Tio estis la unua radio-aparato, kiu venis en ilian vilaĝon. Vespere post la laciga laboro sur la kampoj ili ne iras en gastejojn kaj drinkejojn, sed ili kolektigas kaj aŭskultas la esperantajn disaŭdigojn el la tuta mondo. Operoj kaj operetoj, prelegoj kaj paroladoj — ĉio interesas ilin. Ili ankaŭ aŭskultis la « Venditan fianĉinon » de Smetana. Unu el ili rakontis al mi, ke li jam kelkajn jarojn korespondas kun unu kamparano el Aŭstralio. Ili ne interŝanĝas poŝtmarkojn, sed — semojn. Per unu speco li sukcese semis sian kampon.

Nun en preskaŭ ĉiu vilaĝo estas malfermataj novaj porkomencantaj kursoj. Ekzemple en Ĝurĝevac 32 personoj vizitas ĝin.

Multe ili interesiĝis, ĉu la Universala Kongreso en la jaro 1939 okazos en Zagreb. Se ĝi fakte okazos, kiel ni ĉiuj esperas kaj deziras, tiam ili organizos apartan kunvenon de vilaĝanoj-esperantistoj. Tio ĉi estus — laŭ mia scio — en la historio la unua internacia kunveno de vilaĝanoj (ne de iliaj reprezentantoj!), dum kiu ili mem, sen iaj perantoj, pritraktus siajn aferojn...

✱

Post reveno hejmen, ankoraŭ longe sonis en miaj oreloj la simplaj sed klaraj kaj karaj vortoj de niaj amikoj kaj samideanoj el ĉedravaj vilaĝoj, pri kiuj la vasta mondo malmulte aŭ nenion scias, sed kiuj tamen pere de Esperanto estas en ĉiutaga vigla kontakto kun ĝi...

Kaj por mi persone tiu vizito kaj ĉio, kion mi vidis, havis multe pli grandan signifon ol deko da plej favoraj diroj pri Esperanto el la buŝo eĉ de la plej eminentaj aŭtoritatoj, kiuj tamen — ne ellernas ĝin...!

D-ro Ivo Lapenna.

Atentu !

Aŭskultu kaj gratulu al Radio-Paris!

Bonvolu serĉi en viaj naciaj radio-revuoj sub « Radio-Paris » (1648 m), kiam okazos la venontaj teatro-dissendoj en Esperanto! Oni projektas la jenajn disaŭdigojn: « En la nebulo », japana radio-dramo en Esperanta traduko; « La paco », skeĉo de M. Darnault laŭ Aristofano; tria akto de « La verbo ami » de P. Mortier; « Montmartra vespero » de R. Schwartz; « La nobela burĝo » de Molière; « Advokato Pate-lin » de Brueys kaj Palaprat; « La fianĉiĝo » de A. Kivi; « La formikoj » de Jeanson; « Knock » de Jules Romains; « La malsana kuracisto » de Bernanose; ktp.

Sed... sed... atentu! La unuaj disaŭdigoj estas nur provoj. Se ili estos sukcesaj, t.e. se la eho el la tuta mondo pruvos ke ili estas aŭskultataj, la sekvontaj dissendoj okazos ĉiusemajne. Se!!! Do, ĉiuj esperantistoj kaj ankaŭ ĉiuj amikoj de Esperanto interesiĝu pri la klopodoj de la francaj samideanoj (inter ili profesiaj geaktoroj). Ĉiu devas skribi al: « Esperanto-fako de Direction de Radiodiffusion, 107, rue de Grenelle, Paris ». Radio-Paris estas potenca stacio, bone aŭdebla en ĉiuj landoj de Eŭropo. Aŭskultu la dissendojn! Amase skribu kaj skribigu! De vi dependas la definitiva eniro de Esperanto en la francajn programojn! Publikigu informojn en la gazetoj! Sendu gazeteltondadojn al « Radio-Club Espérantiste de France, 26 Av. Dode de la Brunerie, Paris 16 »!

*) Drava estas rivero inter Hungarujo kaj Jugoslavio.

La Esperanto-Literaturo kreskas

Edmond Privat: Vivo de Zamenhof. Dua eldono. Ilustrita kaj bindita. Prezo 3 ŝ. 6 p., afr. 4 p. Eldonis The Esperanto Publishing Company, Ltd., London. Havebla ĉe la Libroservo de IEL, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo, aŭ por 1.95 guld., inkl. sendkostoj, ĉe Heroldo de Esperanto, Libroservo, Scheveningen, Nederlando.

Kiu libro povas la esperantiston pli interesi ol priskribo pri la vivo de Zamenhof, pri tiu alt-senta kaj genia homo kiu donacis al la mondo la internacian lingvon! Esperanto Publishing Company prezentas la duan eldonon de la libro en plaĉa formo, adaptita al la serio de Populara Esperanto-Biblioteko, kaj por la sama prezo de la volumoj de tiu serio, prezo kiun oni devas nomi por tiel bela eldono vere malalta.

La dua eldono ĝenerale estas fidela respreso de l' teksto de la unua. Oni korektis kelkajn tro evidentajn erarojn, kaj oni aldonis kelkajn novajn ilustraĵojn, sed (la kialon oni ne komprenas) forlasinte kelkajn malnovajn. Krome, la subtittolo de la ĉapitroj, fakte nebezonaĵoj, estas eliminataj.

La nova eldono aperis ĝustatempe antaŭ la Zamenhof-festo. Certe la libro troviĝos, okaze de tiu festo aŭ okaze de Kristnasko, sur la tablo de multaj gesamideanoj. Ankaŭ ĉiu grup-biblioteko, kiu ne jam posedas la unuan eldonon, nepre havigu al si la duan. R-ano.

Ora Libro de la Esperanto-Movado, 1887-1937; redaktis **V. Bleier** kaj **E. Cense**; eld. LKK de la XXIX-a Universala Kongreso de Esperanto 1937. Havebla por 1.50 guld. ĉe la Libro-Servo de « Heroldo de Esperanto », Scheveningen, Nederlando.

Jen la jubilea libro de la Esperanto-Movado! Se ties **adeptoj** jubileas, la **movado** mem ne postrestas. Valora libro kaj bele eldonita en 221 paĝoj grandformataj. Bedaŭrinde enhavtabelo, la spino de libro, mankas. « Liber sine registro ut nauta sine gubernaculo », diras latina proverbo. Ĝis nun mi jam spertis ke nenio en la libro estas trovebla. Oni legis ion, post unu tago oni volas reserĉi la paragrafon kaj — neeble. Jen grava manko, kiu reduktas la valoron de la libro je 75 %.

Memorante kion mi legis, mi nur povas diri, ke ĉiu paĝo interesis min. Specialajn ekzemplon mi ne povas doni, ĉar ja nenio estas trovebla sen kosto de multega tempo, pri kiu mi bedaŭrinde ne disponas. Inspira estis tiuj paĝoj kiujn mi legis pri la pioniroj. Estas bone, dum nia tempo memori iliajn nomojn kaj laboron. Tro multe ni forgesas ilin kaj per kverelado malhonoras ilin. Ĉi tio memorigas min ke mi ankaŭ legis en la libro longegan artikolon de s-ro Hans Jakob pri la organizo. Ne estas mia specialaĵo, kaj mi dezirus ĉion bonan. Sed legante Heroldon kaj multajn aliajn Esperantogazetojn el ĉiuj landoj, mi ĉiam konkludas: kial do oni tiel kverelas! Ĉiu energio estas foruzata por interna batalado. Feliĉe la libro enhavas kelkaj brilajn paĝojn pri aliaj aferoj: prozo, poezio, lingvistiko kaj paĝoj de profetado, kiuj estas kelkfoje vere kortuŝaj.

Bela libro kun multaj ilustraĵoj.

Joh. Hartog.

F. Omelka: Aventuroj de Antonio. — 57 p. 12x16 cm. Kun 5 tutpaĝaj ilustraĵoj. — Krome: **G. H. N. Zeldenthuis: Kongresa renkonto.** 8 p. 11x15 cm. La unua ĉ. kr. 5.—, la dua ĉ. kr. 1.—, plus sendkostoj. Eldonis: Aleš Berka, V Jirchářich 8, Brno, Ĉeĥoslovakio.

Vlada Hvezdský: Pro la ĉarma amo, pro la rava paradizo. — Poezio de l' eterna amo. 19 p. 11,5x17,5 cm. Prezo ĉ. kr. 4.50 ĉe la aŭtoro, Kniznice, « Maják Svobody Lidstva », Vizovice, Ĉeĥoslovakio.

Arĝenta Duopo, jubilea libro pri **Julio Baghy** kaj **Kolomano Kalocsay**, unua volumo, eld. Lit. Mondo, Budapest 1937, 206 paĝoj. Prezo guld. 1,90, inkl. sendkostoj, ĉe la Libro-Servo de « Heroldo de Esperanto », Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

La laŭreatoj de la Esperanto-poezio, Baghy kaj Kalocsay, jubileas la 25-jaran esperantistigon, kaj s-roj Bleier kaj Szilágyi planis la eldonon de jubilea libreto. Ilia redakta laboro komenciĝis, kaj nun, post unujara laboro, ili pretigis « libreton »; 400-paĝan, duvoluman verkon. La unua volumo aperis, kaj ĉi tiu unua volumo alportas multon interesan. Kio ja estas pli interesa ol konatiĝi kun siaj amataj aŭtoroj je bazo de amikeco, eĉ de intimeco. Ĉi tiu libro ebligas al ĉi tiu. Unue la du jubileantoj parolas pri si mem, kaj post tio kvindekda aŭtoroj, amikoj de la laŭreatoj, skizas ĉiujn flankojn de la « vivo kaj verko » de ambaŭ poetoj. La enhavtabelo montras la nomojn preskaŭ de ĉiuj konataj aŭtoroj kaj se la malbela verda kadro ne maltrankviligus la okulon, oni plezure legus la libron. Nun oni devas unue alktimiĝi, ĝis fine oni ne plu vidas la banalan dekoracion. Sed tiam oni ĝuas, ĉar la enhavo katenegas la atenton. Kiel admiranto de Infero-traduko de Kalocsay mi unue legis la tezon de Jaumotte. Estas nur du paĝoj, sed speciale la dua paĝo briligas la tradukinton kaj ties verkon en hela lumo. Komparu kun ĉi tiu tezo la pli scienca tezon de Migliorini, ankaŭ en la libro. Precipe agrabla ankaŭ estas la poeziaĵo de Mijake-siĥej, kies nomon mi ĝis nun neniam aŭdis nek legis, sed de kiu ni esperu pluan laboron.

Interesa estas la tezo de sinjorino Baghy, ankaŭ nekonata ĝis nun en la esperantista rondo. Kaj eĉ Julieta, la filino de Baghy, kontribuis.

Kaj tiel plu. Ne estas eble resumi eĉ kvaronon. Ĉi tiun libron ĉiu devas posedi. Nenomitaĵo restis la multaj interesaj ilustraĵoj.

Longe vivu kaj laboru ankoraŭ ambaŭ laŭreatoj!

Joh. Hartog.

Agatha Christie: Murdo en la Orienta Ekspreso. Tradukita el la angla de Etulo. N-ro 1 de la « Epoko »-Libroklubo. 192 p. 11,5x18,3 cm. Prezo por membroj de la Libroklubo 1 ŝ. plus afranko, por nemembroj 2 ŝ. plus afranko. Oni povas aliĝi al la klubo, aŭ aĉeti apartajn numerojn, ĉe preskaŭ ĉiu esperantista libro-vendisto, aŭ ĉe la Libroservo de IEL. Eldonita de The Esp. Publ. Comp., Anglujo. (Noto: La eldonistoj bezonas taŭgajn manuskriptojn por tiu serio — skribu sub adreso de IEL!) La Libroservo de Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando, akceptas aliĝojn al la « Epoko »-Libroklubo (oni pagas 1.95 gld. por tri volumoj, inkl. sendkostoj).

La « Epoko »-Libroklubo komencas sian serion per interesa detektiv-romano, speciale taŭga por legado dum vojaĝo. Efektive, mi legis ĝin en la vagonaro, — kaj kun plezuro mi sekvis de paĝo al paĝo ĝian enhavon, kiu estas kun konsekvenco kaj psikologia kompreno disvolvita.

La titolo diras, pri kio temas en la libro. Tamen ĝi estas ne simpla « murdo », sed io nepre pli signifa, kaj ĝi okazas en tiel strangaj cirkonstancoj, ke la problemo, eltrovi la « murdinton », eĉ por la lertega detektivo Hercule Poirot prezentas en la komenco ŝajne nerompoblan nukson. Tamen li rompas ĝin — laŭgrade, kaj la rezultoj de lia eltrovo — « romp »-kapablo estas vere mirigaj. Sed ion plian mi ne malkaŝos; legu mem! M.

Börje nu! Esperanto. — Efika afiŝego dukolore presita, pri Esp.-kursoj de ABF, Göteborg. 70x120 cm. Krome **prospekto** pri la samaj kursoj, okazantaj en diversaj lernejoj.

Komuna kantlibro. — Redaktita de H. W. kaj N. Holmes. 64 p. 13x20,5 cm. Prezo unu ŝilingo, plus unu penco por afranko. Eldonis Esp. Publ. Company. Ricevebla de IEL, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo, aŭ por guld. 0.55, inkl. sendkostoj, de la Libro-servo de « Heroldo de Esperanto », Scheveningen, Nederlando.

« La celo de ĉi tiu libreto estas instigi al kunkantado dum grupkunvenoj, ekskursoj kaj aliaj gajaj okazoj », kaj — la celo ŝajnas bone atingita. La kantoj, plejparte britaj, ĝenerale estas lerte tradukitaj, la akompano (pina) estas facila kaj tamen plaĉa; pluraj el la kantoj estas vere kapablaj krei gajan atmosferon; do, prenu la libreton, ĉu tiu gajaj!

M.

D-ro Antoni Czubyński: Interŝtata Esperanto-Akordo pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. — 20 p. 12x17 cm. Eldonis LKK de la 29-a, Warszawa. Prezo ne montrita.

Grava verketo, en kiu oni trovas la ĉefajn datojn kaj faktojn pri tio kio ĝis nun estas entreprenita koncerne la « Esperanto-akordon ». Bedaŭrinde la malbona preso (multaj literoj restis en la « aero ») faras la legadon malplezur.

M.

MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO. — Ĉiu serio ampleksas 10 volumetojn de 32-36 paĝoj kun formato 13x20 cm. — Unuopa volumeto kosta 0,35 guld., tuta serio 2,50 guldenojn inkl. sendkostoj. — Eldonas J. Muusses, Purmerend (Nederlando). — Havebla ĉe la Libroservo de Heroldo, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando. (Recenzojn pri la 1-a serio vidu en n-roj 927, 938 kaj 943.)

La finon de la 1-a serio de M.E.B. formis raportaro pri la arĝent-jubilea kongreso de Esperanto en Krakovo, 1912; la 2-an serion komencas volumeto pri la orjubilea kongreso de nia lingvo en Varsovio, kiu okazis la ĵus pasintan someron. Du mejloŝtonoj de nia movado — du gravaj markoj dum la senhalta marŝado antaŭen.

N-ro 11: La Ora Jubilea Kongreso de Esperanto 1937.

Paroladoj faritaj okaze de la 29-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, 7a-15a de aŭgusto 1937. — Aranĝis kaj kompilis Julius Glück.

La subtittolo mem klarigas la enhavon. Kompreneble, ne ĉiuj paroladoj trovis lokon en la libreto. La juĝon pri la ĝusta trafo de l' elekto oni devas lasi al la kompetentuloj inter la kongresintoj. Cetere, ĉiuj prezentitaj paroladoj estas interesaj, belaj kaj kelkfoje eĉ kortuŝaj, speciale tiuj faritaj ĉe la tombo de l' Majstro kaj de lia unua disĉiplo Grabowski.

Kiuj verkis, kiuj faris la paroladojn? Estas la prezidanto de nia IEL, s-ro Bastien; s-ro J. Glück mem, kiun ligas tiom da rememoroj al la vivtempo de niaj klasikuloj; s-ro Paul Ny-lén, malnova heroo de la movado kaj, laste seniel malĉefe, s-ino Varma Thilander, la edzino de nia ĵus jubileinta blindulguidanto Harald Thilander, mem blinda, kaj delikatsanta poetino. Fine, en aldono, ni trovas kontribuojn de D-ro Zamenhof: artikolon el « Lingvo Internacia » (1905), verkitan antaŭ la Bulonja Kongreso. Tio, kion la Majstro diris pri la celo de niaj universalaĵ kunvenegoj kaj pri la spirito kiu devas regi en ili, estas kaj estos ankoraŭ estonte atentinda same kiel ĝi estis en pasinteco. Tial ne malutilas relegi la artikolon speciale antaŭ ĉiu kongreso, kaj republikigi la Zamenhofajn pensojn antaŭ la unua kongreso nun, kiam la movado festis la oran jubileon de la lingvo.

Jofebo.

Werner Zimmermann:

Mondlingvo

Kalgan, Mongolia limo. Frumateno. Kun dudek ĉinoj interprete mi sidas en balanca, aera alto sur la amasigita ŝarĝo de varaŭtomobilo. Ni veturas en la internmongolan stepon, al Tolon-noor (ruslingve) aŭ Lama-miao (ĉinlingve), la ĉina komercista urbo, kiu plej dense alŝoviĝis al la dezerto Gobi. La vojo egalas proksimume la longon de Svislando, distingiĝas ĝenerale per nenio cetera krom duobla radspuro¹⁾, kiu kelkfoje eĉ tute perdiĝas, — kaj antaŭ la nokto ni devos esti tie!

Kun laŭta, estreca hupado²⁾ trabusas la grandega amerika veturilo la dezertogrizan urbon, kirle ĵetante la polvon en la beletaspektajn butikojn, kie jam kelkaj ĉinaj komercistoj, en solena silko vestitaj, atendas la malmultiĝintajn klientojn. La ekstera Mongolio, de kvar-kvin jaroj apartenanta al Sovetio, komercadas preskaŭ jam nur kun Ruslando, kaj Kalgan, iam fiera kaj estra kaj riĉa, malmanetas kaj malrapide mortadas, kvieta, preskaŭ serena, sen perdi la dignan memestrecon: ĉinoj scias morti same kiel vivi.

Kun subita ekskuo ni haltas. Soldatoj. Urba limo. Tuj ili trovis min, min — la solan fremdulon. Ĉiujn ceterajn ili ne plu atentis; sed ŝajnas ke de mi ili deziras kelkion. Ĉiam denove la oficiro faras al mi demandojn, kaj ĉiam denove mi nur povas kun rideto levi la ŝultrojn, por kompreni al li ke mi ne komprenas. Poste mi gestas dirante: « Tolon-noor — Kalgan! », mi deziras vojaĝi tien kaj reen — mi montras al li la kvitancon ke mi pagis por la veturo, mian svisan pasporton — sed li volas ion alian, malpacientiĝas, gestegas — ĉu monon li volas? Iom post iom la afero jam fariĝas malagraba — kion mi faru?

Jen subite venas viro en blanka supervesto, kun ronda, paca vizaĝo, tuj kaptas la situacion kaj demandas supren al mi:

— Ĉu vi parolas Esperanton?

— Jes.

Vole nevole eliĝas tiu respondo. Kiel strange mi sentas min subite! Ĉe la mongolia limo — ĉina esperantisto! Antaŭ dudek jaroj mi supraĵe rigardis en Esperanto-libreton, kaj de tiam plu neniam. Sed kiu scias kelkajn ĝermanajn kaj romanajn lingvojn, tiu kapblas, se necese, facile interkompreni kun esperantisto aŭ alia mondlingvulo.

El miaj okuloj ridas mirĝojo, kaj pro mia rapida respondo glitas kontenta rideto trans la kvietan vizaĝon de l' ĉielo-filo. Li plu demandas:

— Kiu nacio?

— Suizo, mi eltrovas la vorton.

Li ion klarigas al la oficiro, kiu nun afable kapjesas, dum ĉiuj ĉirkaŭstarantoj kore ridas mirigite kaj aprobe, ĉar ni kapblas interkompreni. Ankaŭ la soldatoj komencas rideti: ili fariĝas homoj.

— Ĉu vi havas name-card?

Ĉinoj kaj japanoj diras angle kaj tradukas « name-card », nomkarto (vizitkarto). Ĉi tiu ludas grandan rolon. Ĉiu, kiu volas esti konsiderata kiel homo bonedukita kaj klera, ĉiam portas ilin kun si, preta kaj avida elpreni ilin je ĉiu okazo kaj interŝanĝi kun aliaj. Ŝajnis al mi, ke la esperantisto diris « name-card » laŭ angla prononco — egale, mi tuj komprenis lin.

Stulte, mi ne pripensis antaŭe, presigi por mi vizitkartojn en ĉina lingvo. Nun mi ĝojas, ke sur plurajn el miaj germanaj kaj anglaj kartoj mi premis mian ruĝan ĉinan nomstampon. La stampilon mi estis ricevinta donace de miaj ĉinaj amikoj, ĉe kiuj mi loĝis en Peking³⁾, okaze de mia naskiĝtago.

La traduko de fremdaj nomoj en la ĉinan lingvon kaj skribon estas amuza afero. La esencaj s k r i b signoj estas egalaj en Nipono⁴⁾ kiel en tuta Ĉinujo, tiel ke ili estas facile legeblaj kaj kompreneblaj por ĉiuj. Sed la p a r o l a t a vorto sonas en Nipono tute malsame ol en Ĉinujo, — eĉ nord-, mez- kaj sud-ĉinoj ĝenerale ne povas interkompreni parole, sed nur legante la unuecajn skribsignojn. Kvankam parolata Pekingaŭ nordĉina lingvo, la tiel nomita mandarena lingvo, havas en tuta Ĉinujo certan superregon, kaj oni kredas ke ĉiuj pli malpli instruitoj ĝin komprenas.

La traduko de fremda familia nomo okazas ne laŭ ĝia eventuala signifo, kian ĝi ofte posedas, sed oni serĉas por la unuopaj silaboj la vortojn simile sonantajn. Sekve en la Peking-lingvo mia nomo ne estas « ĉarpentisto » (= Zimmermann), en tiu senco ke oni donus al mi la signon kaj vorton por ĉarpentisto, sed « ĉin-mao-man », kaj tio signifas « oro-brila-plena ».

Mi do estas: « Oro Brila Plena » (= plena de brila oro), aŭ, ĉar la ĉinoj ĝenerale uzas nur la unuan el la tri unu-silabaj vortoj de sia nomo: Mr. Ĉin, Sinjoro Oro. Al mia sigelo estas aldonita ankoraŭ kvara signo: jin (= sigelo). La ĉinoj skribas la signojn ne horizontale, sed vertikale de supre malsupren: li komencas en la dekstra supra angulo kaj

aldonas la sekvantajn liniojn maldekstre.

Mi donas unu el la kartoj al la oficiro, kaj estas tre amuze, kiel li nun laŭte legas kaj, por certeco, min demandas:

— Ĉin-mao-man?

kaj mi kompleze ĝin ripetas konfirman-te. Ankaŭ al mia Esperanto-amiko mi donas vizitkarton. Li estas tre ĝojigita, rapidas domen kaj revenas alportante al mi la sian.

Fiere li rakontas.

— Mi estas membro de la ligo esperantista!

— Esperanto bona! mi ekmemoras.

— Jes — li radias, kaj aldonas:

— Vi estas mia amiko! — kaj tio sonas al miaj oreloj tre malfremde, rememorigante min pri tio, kiel antaŭ unu jaro idianoj en la montaraj regionoj de Gvatemalo kaj Meksiko okaze alparolis min hispane: « amigo ».

De sur la varaŭto mi etendas al li la manon — forta skuo. Kaj ni ekveturas, direkte al la montoj, al la ekstera Granda Murego, al la stepo...

Kun permeso tradukis:
Tojo.

✱

Postrimarko: Werner Zimmermann estas konata mondvojaĝanto kaj verkisto svisa. La supra ĉapitro estas ĉerpita el lia verko « Weltheimat » (Mondpatrujo), aperinta dum la nuna jaro ĉe la eldonejo Rudolf Zitzmann Verlag en Bern (Svislando) kaj Lauf bei Nürnberg (Germanlando); prezo broŝ. sv. fk. 7.50, bind. 9.—. La libro enhavas reprodukon de la « nomkarto » de l' ĉina esperantisto. Li nomiĝas Lju Sian Zuo, kaj estas — laŭ la nomkarto — « tradukanto al la ruso- kaj mongolo-lingvoj ». Li eĉ posedas telefonon (N288, AU135).

Kiel oni aŭdas, s-ro Zimmermann komencis antaŭ nelonge serioze sin okupi pri Esperanto, por ellerni ĝin. Nia movado certe akirus en li valoran amikon.

¹⁾ spuro = postsigno;

²⁾ hupo = aŭtomobiltrumpeto; hupi = signali per aŭtohujo;

³⁾ Peking nun nomiĝas Peiping.

⁴⁾ Nipono = Japanujo.

Esperanto en Radio

La unua internacia Esperanto-relajo,

la opero « Kiso » de Smetana, alvenigis al la Verda Stacio en Brno 840 alskribojn el 27 ŝtatoj. Sed ŝajnas ke en tiu ĉi nombro ne estas entenataj la alskriboj al Lyon, Kaunas kaj Klai-peda/Memel.

Atentu pri la estonaj stacioj!

Kroniko el Tallinn kaj Tartu okazas ĉiunmarde je 22.00-22.10 MET; la monata kroniko por novembro okazis la 18.11. je 21.30-21.55 MET, temo: Observo pri la lasta kvaronjaro en Estonio. La 16.12. oni disaŭdigas: Arango de Supera Klerigo en Estonio. Aŭskultu kaj raportu aŭ gratulu!

Kristnaska stelo.

Meze en vintro, en neĝ' kaj glacio
Rozoj de l' amo nun floras;
Sanguĝaj rozoj varmigas la korojn,
Amon ni ree adoras.

Meze en jare plej griza mallumo
Brilas la plej luma helo;
Ora lumstedo almontras la vojon:
Estas kristnaska la stelo.

G. K.

Alveno de l'Universo

Historio pri civilizacio malkaŝas ke alte disvolvitaĵoj en la daŭro de sia evolado trapasis fazojn karakterizajn pro la kulminado de diversaj homaj aktivecoj, fizikaj kaj intelektaj. Oni ne konkludu ke la evidentigo de ekstrema aktiveco speciala en unu periodo estis akompanita de malgrandiĝo de ĉiuj aliaj formoj aktivaj, aŭ ke ĝia disvolviĝo suferigis la aliajn formojn. La historio instruas ke, kune kun la ĝenerala nacia aktiveco, certaj epokoj atestis specialajn aktivecojn aŭ atingis specialajn maksimumajn disvolviĝojn, kiuj servis por impresi la epokon per ia ĝenerala karakterizo. Tiel estis epoko de filozofio en antikva Grekujo, de militarismo en antikva Roma regno, de sankta arto en mezepoka Italujo, kaj de drama poezio en Anglujo dum la Elizabeta periodo.

La influo de tiaj epokoj percepteblaj aŭ nepercepteblaj etendiĝas de malproksima pasinteco ĝis la nuna tempo; la konstato de tiu influo troviĝas en bone konata popoldiro ke ni estas heredantoj de ĉiuj antaŭaj epokoj.

La speciala *scienco* aktiveco en la nuna tempo estas destinita por influo la estontecon pli profunde ol tiuj aktivecoj kiuj atingis sian kulminon dum la pasintaj epokoj. La fakto, ke ni nun loĝas en periodo de scienco, signifas ke pli multe ol antaŭe ni estas ebligataj, intime interrilatadi kun la naturo. De post la tempo, kiam la homo fariĝis observema, pensema estajo, li devas esti impresita de naturaj fenomenoj; sed en la antaŭa periodo laŭ konservitaj historiaj arkivoj ekzistis tia interesa aktiveco en la demando pri naturo, en la sistema observado de faktoj, kaj en la penado atingi la scion de kaŭzoj. La ideojn, kiuj superregis la pensadon en la pli fruaj tempoj, malrapide anstataŭas tia vasta vidpunkto kiu kunligas la homon kun la naturo kvankam lia organismo estas konformigita al sia ĉirkaŭaĵo ĝuste kiel ia alia organismo, sed li posedas superregan pluitilon de preskaŭ senlima konformeco per sia intelekta disvolviĝo. Tiu ebleco de konformiĝo estas sinonima kun sciado pri la metodoj de la naturo;

La Impulso

Novelo de A. E. Cortinas.

(Fino)

— Jes, aŭdiĝis lia trankvilvoĉa certigo. Miaj enspezoj ne sufiĉas por alia. Mi honeste klopodas por la porvivo; bedaŭrinde mankas al mi la protektaĵoj.

— Teda afero! Sed laŭ mia scio vi posedas proprajn.

— Ĉio perdita, kara Rujena! Mi suferis gravajn operaciojn de la laringo kaj de la cekumo; mi devis okupi unuarangajn kuracistojn. Nenio restis al mi.

— Do, verdire, vi estas almuzula artisto, ŝi mokis. Kiu antaŭsentis tion! Sed pardonu, ŝi deturnis la temon, ke mi forlasas vin por hodiaŭ; mi ekpensas ke mi promesis pluajn vizitojn.

Ŝi malaperis, kaj Tomáš unu momenton staris senmove. Denove perdiĝis ioma kredo pri homa valoro! Kiamaniere li povus revivigi sian malĝojan animstatojn? Li pensis pri Stromovka, la ĉarma parko, kie li kelkfoje kunvenis kun Zdenka por fari koran interparolon. Eble li renkontos ŝin tie hodiaŭ? Konsola ideo; tuj kiam li ekhavis ĝin, li prenis ĉapelon kaj bastonon kaj forrapidis.

Ĉar estis ankoraŭ mateno, li riskis malrektan vojon, irante okcidenten, ĝis kiam li troviĝis ekster la vastega domaro de l' urbo kaj inter verdaj ĝardenoj li atingis la fervojon. Ĉi tie li flankiĝis norden.

La junia suno brilis varme; blankaj nuboj naĝis tra la ĉielo, pelataj de vivaj aerfluo. Dum Tomáš senzorge ĝuis la ĉarmon de l' naturo, subita ventopuŝo forŝiris la pajloĉapelon de lia kapo kaj blovis ĝin sur la fervojan linion, kie ĝi restis kuŝanta inter la relojn.

Rapidege Tomáš postkuris la ĉapelon kaj ekprenis ĝin; sed kiam li klopodis reiri al la strato, li sentis sin retenata surtere. Li rigardis tien: lia dekstra piedo estis ŝoviĝinta en fendon inter relo kaj tero kaj estis tie premkaptita. Tomáš tiris per ekstrema forto por liberigi sin, sed vane.

Frosta teruro! La reloj ekstremis pro la pezo de alproksimiĝanta vagonaro. En

sia malespero, Tomáš tiris tiom forte, ke la sangalfluo preskaŭ krevigis lian kapon: la piedo restis fiksa! Jam li estis en ega danĝero. Li ekvidis malproksime la lokomotivon, kiu fulmrapide pligrandiĝis.

Tiam apud li eksonis akra krio. Ies manoj ekprenis lian kaptitan piedon kaj ŝiris ĝin tien kaj reen, supren kaj malsupren. Subite Tomáš sentis, ke li liberiĝis; li estis ankoraŭ malforte puŝata kaj falis dorse en la sablon. Preskaŭ samtempe, tondrosimile preterveturis la vagonaro... Tomáš svenis.

Regajnte la konscion, li troviĝis en la strato, ĉirkaŭata de pasantoj, kiuj vidis la okazaĵon, kaj apogata de kelkaj personoj.

— Sinjoro, iu viro diris al li kompateme, vi ŝuldas al via brava edzino ke vi ankoraŭ vivas!

Tomáš ekvidis palan vizaĝon, kiu observis lin plorante.

— Zdenka! balbutis liaj lipoj.

Baldaŭ li tiom refortiĝis, ke li povis iri sen helpo. Senvorte li prezentis sian brakon al Zdenka, kaj ili daŭrigis kune la promenadon al la Stromovka. La publiko diskuris.

Tomáš divenis, pro kio la amata knabino ĵus ĉeestis, kiam li troviĝis proksime de la morto. Ankaŭ ŝi esperis renkonti lin en la parko kaj decidis por la sama vojo.

Ili sidiĝis sur benkon de l' Stromovka. Super ili bonodoris la akacioj, kies blankaj floroj malrapide, turniĝante, falis, falis. Komence, iom da tempo ili sidis silente, poste la abundeco de sentimentoj instigis ilin paroli.

La impulso, la impulso! Tiu ĉi penso tralumigis la animon de la pentristo.

Laŭ sciigo de Zdenka, plenumante sian peton, la profesoro Slíva intencis atentigi fakulojn pri la talento de la artisto kaj tiamaniere famigi lin, sed Tomáš konfesis al ŝi la veron: lia ŝajna malriĉeco kaj seninfluo estis nura rimeco por provi sian koron, ĉar jam de longe li havis reputacion kaj ne bezonis plu ies helpon.

Ili sciis, ke la terura momento, kiu faris ilian plej forton interligon, restos neforgesebla, kaj ili ĵuris neniam forlasi unu la alian.

la estonta progreso kaj nuna bonfarto de la homa raso dependas de la disvolviĝo de scienco natura. Superregado de la homo nedisigeble estas ligita kun sciencia progresado.

Pripensante pri la kvanto da nekonataj fenomenoj en antikvaj periodoj de la homo, kaj pri la kompara scio kaj plena kompreno de tiaj samaj fenome-

noj en la nuna tempo, oni trovas la konkludon, ke estas verŝajne ke la restantaj fenomenoj nekompreneblaj pli kaj pli klariĝos per eventuala eltrovo de iliaj kaŭzoj, ĝis kiam restos malpli kaj malpli multaj fenomenoj eksplikotaj. Fine evidentiĝos al la homo la alveno de l' Universo, — tiel kompletiĝos la homa scio.

Harold Foulds.

LA ESPERANTISTA REKLAMO

Naskiĝo. Al ges-roj Edmund Fethke en **Bydgoszcz** (Polujo) naskiĝis la 18.10.1937 filieto Erazm. — Koran gratulon!

Internacia geedziĝo. En **Bolzano** (Italujo) edziĝis nia samideano Arturo Nicolotti kun asmideanino f-ino Vera Milbrets el **Liepaja** (Latvio). Laŭ nia scio, ĉi tiu estas la dua edziĝo de itala samideano kun ekesterlandanino (post kiam s-ano Giovanni Della Savia en Udine edziĝis kun hungarino), kaj pro tio, ke italoj ĝenerale tre malofte edziĝas kun eksterlandanoj, ĉi tiu edziĝo pravas unu plian fojon, ke Esperanto estas bona edzperanto. — Nian plej koran gratulon!

Geedziĝis la 16.10.1937 gesamideanoj Tynne Leivo kaj Nils Larsson en **Helsinki**, Finnlando. — Koran gratulon!

Edziĝon kun samideanino (aĝo 30-40 jaroj) deziras 38-jara solule vivanta esperantisto, 167 cm alta, sana, laborema, neriĉa. Aspiras modelan, harmonian edzecon; havaĵo ne gravas. Ofertojn (aldonu bildon, kiun mi certe resendos) bonvolu direkti sub « K.M. 43 » al la redakcio de « Heroldo de Esperanto », Harstenhoekweg 223, **Scheveningen**, Nederlando

Letervesperon aranĝos Klubo Esperantista en Oslo la 7.12.1937. Montru ke Esperanto vivas ĉie en la mondo! Ĉiu ricevos respondon. Adresu al f-ino E. Grønneberg, Industrig. 28, **Oslo**, Norvegujo.

Letervespero, la 12-an de januaro 1938: «Flandrama Grupo Esperantista», Stefaniestr. 44, **Antwerpen**, Belgujo, petas tutmondajn samideanojn sendi leterojn, poŝtkartojn ktp. Respondo certa.

Letervespero Olomouc, 17.12.1937. Skribu multnombre! Interesajn leterojn rekomencos per valoraj libropremioj Moraviaj Esperanto-Pioniroj, Riegrova 17, **Olomouc**, Ĉeĥoslovakujo. (455)

Poŝtkartvesperon aranĝos la Esperanto-Klubo en Motala, Svedujo, 15 jan. 1938. Sendu belajn poŝtkartojn el ĉiuj partoj de la mondo! Subskribinto garantias respondon al ĉiuj. Sendu al: S-ro Carl Hallros, JEL-delegito, Bispomtala Handelsträdgård, **Motala**, Svedujo.

Dudek-jara junulo, lernanto, deziras korespondi kun samidean(in)oj ĉiulandaj, poŝtkarte aŭ letere. Ankaŭ kolektas poŝtmarkojn. Harald Flood, **Sandhem**, Svedujo.

Mi deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj, leteroj kaj interŝanĝi fotografiajn kun gesamideanoj tutmondaj. Certe respondos. Gustav Nyqvist, Box 80, **Skara**, Svedujo.

Juna angla soldato deziras korespondi kun gejunuloj en ĉiuj landoj. Lance/Cpl. E. J. Weall, R.A.S.C., War Office, **Khartoum**, Anglo-Egipta Sudano, Afriko.

Tutmondan korespondadon per leteroj kaj poŝtkartoj deziras flegistino, ankaŭ kun kolegiinoj. Respondo garantiata. F-ino M. C. Wessdyk, « Dennenoord », **Zuidlaren**, Nederlando.

Korespondadi deziras kun ĉiuj landoj per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj: Jaroš Stachura, **Prostějov**-Drozdovice 3, Ĉeĥoslovakio. Nepre respondos.

Korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj deziras: S-ro Václav Dlábač, **Ričany u Prahy 94**, Ĉeĥoslovakio.

Atentu adreson! Ĉiuj skribaĵoj kaj sendaĵoj por nia klubo: **Esperanto-unuiĝo « Verda Stelo » en Praha**, estu sendataj al la adreso: Hans Moder, sekretario, Praha XII, Na Švihance 6, II, Ĉeĥoslovakio.

Ricevfesto (20 novuloj) kaj **letervespero** komence de decembro. — Samideanoj! ni bezonas vian helpon. Respondo garantiata. Skribu al: **Holstebro Radio**, Danlando.

Pri la literaturo por infanoj, mi volas scii la evoluon historion en via lando, la modernajn verkistojn kaj verkojn reprezentitajn kun iliaj tendencoj, kaj gazetojn. Mi interŝanĝos kun vi tiuspecan materialon aŭ gazeton. Korespondu en Esperanto! S-ro Simohata-Taku, Nisiyamasita I, Hirota, **Nisinomiya-si**, Japanujo.

S-ro Torsten Bruér, Föreningsgatan 70, **Malmö**, Svedujo, deziras korespondi kun tumondaj esperantistoj kaj interŝanĝi poŝtkartojn.

Interŝanĝo. Karl Österberg, Ängturbin, **Salstjö-Järta**, Svedujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Certe respondos.

Usono. Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tutmondo. Certe respondu. Frank A. Guth, 2333 North 59th Street, **Seattle**, Washington.

Junaj usonaj geknaboj en Esperanta klaso deziras korespondi kun 13-15 jaraj geknaboj ĉiulandaj. Skribu al: F-ino Philippa Stoneham, 405 So. Houston St., **Bryan**, Texas, Usono.

Kuraĝe ni vojaĝu tra la mondo ronda pere de leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj! Samcelanoj skribu al Andreo Måkens, **Liepaja**, Poŝtejo, Latvio. Certe respondos almenaŭ unufoje.

20-jara dana terkulturisto deziras korespondon kun tutmondaj gesamideanoj pri diversaj temoj. Skribu al s-ro Paul Stensgaard Hansen, Tune Landboskole, **Teastrup St.**, Danlando.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. S-ro Vichor Sörensen, Emb pr. Ö. Assels, **Morsö**, Danlando.

Tutmondan korespondadon per ilustritaj poŝtkartoj kaj poŝtmarkojn interŝanĝon deziras 32-jara ĉeĥoslovakio. Respondo garantiata. Skribu al s-ro Frant. Gühl, **Trnovany-Teplice**, Dr. Benešová 62, Ĉeĥoslovakio.

Mi deziras interŝanĝi kun geesperantistoj poŝtmarkojn, poŝtkartojn, ilustritajn gazetojn kaj librojn. S-ro Lu-Sue Yong, c/o 38, Brickfields Road, **Kuala Lumpur**, Malaya.

S-ro Emil Jirku, Hor. Srnienemšová, Ĉeĥoslovakujo, deziras korespondi kun transmaraj landoj pri folkloro. Interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj sekajn planetojn.

Mi vendos aŭ por poŝtmarkoj interŝanĝe sendos belajn fotografiajn de prezidanto Masaryk kun funebra poŝtmarko kaj stampo: 21.IX. 1937. František Smolík, Biskupcova 1763, **Praha XI**, Ĉeĥoslovakio.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun fakaj filatelistoj de Belgio, Aŭstrio, Germanujo, Rumanujo, Hungarujo kaj Svedujo laŭ Michel 1938. Kompletaj serioj neuzitaj estas preferataj: František Ulbrich, **Uherské Hradiště**, Ĉeĥoslovakujo.

Sténo-Ecole, 121, Avenue Victor Hugo, **Boulogne-Billancourt** (Seine), Francujo, ekstarigas Esperantan kurson. Aĝe, poŝtkarte dankesprimu; Rekompence vi ricevos karton dum decembro.

Internacia Katolika Informejo. — Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, senpage povas ricevi ilin de **Fr. M. Monulfus**, sekretario de l' Internacia Katolika Informejo, Instituto S-ta Nikolao, **Oss**, Nederlando. (310)

Rakontoj kaj artikoloj pri homoj, bestoj kaj aventuroj en Borneo kaj aliaj aziaj landoj, de R. F. Vaughan: « **El Verdavallo** » por 1936; 48 paĝoj kontraŭ 5 internaciaj respondkuponoj. Mendu senpere de R. F. Vaughan, Sandakan, British North Borneo. (370)

Lingvo-Libro informas vin pri ĉiu okazo en nia literaturo. Abonu ĝin kune kun viaj amikoj! Abonprezo por jaro kaj tri ekzempleroj kune sendataj por egalvaloro de 0.80 ned. guld. ĉe la eldonejo Literatura Mondo en Budapeŝt. (394)

Kursgvidantoj atentu! Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendas donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, **Budapest VIII**, Mária-u. 34. (407)

Kvakerismo kaj Paco. Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1**, Anglujo. (432)

Por respondkupono vi ricevas rakontojn el la hungara literaturo (32 paĝoj). Sendu al P. Balkányi, **Budapest 507**, Hungarujo. (441)

Skribaj kursoj (por hollandlingvanoj), por diplomoj A kaj B. Gvidanto: Simon Aarse. «La Verda Stelo», Radioweg 45, **Amsterdam-O.**, Nederlando. (449)

Latva instruistino deziras korespondi kun ĉiulandanoj, kiujn interesas naturo, arto kaj tutmonda homamo. F-ino E. Apinš, p.k. 18, Vecslabada, **Latvio**. (450)

La 13-a eldono de « BES-Adresaro » ankoraŭ ne povis aperi pro grava malsano de ĝia redaktoro. Sed nun ĝi estas jam preparata por la preso kaj aperos vintre 1937/38. La jam aliĝintoj afable informu la redakcion de « BES-Adresaro », **Potštejn, Ĉeĥoslovakio**, pri eventualaj ŝanĝoj de adreso. (451)

Poŝtmarkoj! S-ro J. Collier, 14 Warren Hill Road, Erdington, **Birmingham**, Anglujo, interŝanĝas kvanton kontraŭ kvanto, 100 ĝis 500. Afranku filatele! Mi deziras daŭrajn rilatojn por interŝanĝado kun ĉiu lando. (452)

Senpage publikigas adresojn de geknaboj, kiuj deziras korespondi, la monata gazeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: Marathonweg 15, II., **Amsterdam**, Nederlando. (453)

Por du internaciaj respond-kuponoj vi ricevas 32-paĝan interesan libron «Vorto Viva» pri la biblio, por unu respond-kupono bibliajn studplanon. Ni volonte respondas pri religiajn demandojn. Sveda K.E.L.I., **Kumla**, Svedujo. (454)

Jubileajn poŝtkartojn (Delaware-Jubileo) aŭ eldonotajn poŝtmarkojn (novajn tipojn) **stampitajn eldontage** sendas kontraŭ filatele afrankitaj poŝtaĵoj, fotoj, propagandajoj ktp. s-ro Bertil Zell, (Henrikson), Södra Larmgatan 11, **Göteborg**, Svedlando. Nepre respondas! (456)

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S Antverpeno — Belgujo.



Por la Librotago 1937!

La prezoj estas indikitaj en nederlandaj guldenoj. Se oni mendas por minimume 1.— guldeno entute, ili entenas la sendkostojn. Se la mendo restas sub 1.— guldeno, oni aldonu en ĉiu okazo 0.05 guldenon por pako kaj afranko.

	broŝ.	bind.
Baghy. Printempo en la aŭtuno. Novelo	0.75	
Blicher (Bulthuis). Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	0.15	
Boatman. Jes, panjo. Komedioto	0.15	
Boatman. La nekonata konato. Mistera rakonto	1.20	1.80
Bröther. Rübezahl. Porjunulara legaĵo	0.15	
Bukedo. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj	0.15	
Elola (Berenguer). La amo en la jaro dek mil. Romano. 352 paĝoj	1.50	2.40
Forst de Battaglia (Jung). La mistero de l' sango. Aktuala scienca verko. Kun multaj portretoj kaj genealogiaj tabeloj	1.20	1.80
Grimm. Du fabeloj. Porinfana legaĵo	0.15	
Haefker. Jarmiloj pasas. Universala historio (mondhistorio) originale verkita en Esperanto. La plej bela Esperanto-libro laŭ bibliofila vidpunkto kaj kun valora scienca enhavo, verkita en interesa maniero. Kun ses artaj reproduktaĵoj kaj dek unu geografiaj skizoj. Du volumoj kun ledaj dorsoj, verde kaj ore surpresitaj; la broŝurita eldono en unu volumego kun fortika ŝirmkovrilo	4.50	6.30
Herceg. Pangea, la sole ebla eliro el la mondkrizo	0.15	
Heroldo-Taschenwörterbuch (Esperanto-Deutsch, Esperanto-Suchbüchlein, Deutsch-Esperanto)	0.60	
Heroldo-Jugendwörterbuch (Esperanto-Deutsch)	0.15	
Hesse. Sonoj novaj kaj malnovaj. Versaĵoj	0.15	
Hohlov. La tajdo. Lirikaj versaĵoj	0.30	
Ilustrita Biblioteko, serio I: Oriento. La tuta serio (kvin numeroj) kostas en unu bela volumeto bindita 1.50; unuopa numero kostas 0.15. Aparte haveblaj estas n-roj 1/2 kaj 4; n-roj 3 kaj 5 estas (kiel apartaj numeroj) elĉerpitaj. Jen la titoloj de la apartaj volumetoj: N-roj 1/2. v. d. Broek: <i>Devi Angreni</i> kaj <i>Mak Miah.</i> Du rakontoj el Javo. N-ro 3. Kuo (Chun): <i>Ribelemaj virinoj.</i> Moderna ĉina dramo en du aktoj. N-ro 4. Kalidasa: <i>Sakuntala.</i> Rakonto el la antikva Hindujo. N-ro 5. Mil kaj unu noktoj. Tri rakontoj el la mondfama fabelkolekto.		
Ilustrita Biblioteko, serio II: La Maro. Prezroj la samaj kiel ĉe la I-a serio. Jen la titoloj de la apartaj volumetoj (ĉiuj kvin estas haveblaj): N-roj 6/7. Gerstäcker: <i>La ŝipĉarpentisto.</i> N-ro 8. Fock (Jarczewski): <i>Navigado estas necesa,</i> kaj du aliaj rakontoj. N-ro 9. Gudrun. <i>Rakonto laŭ la konata eposo.</i> N-ro 10. Cunningham (Newell kaj Sturmer): <i>La hantataj ŝipoj.</i> — Krome: Clarke Russell (Newell kaj Sturmer): <i>Suldpedelo sur la maro.</i>		
Isac (Morariu). Sonorilo kaj kanono. Rakontetoj	0.30	
Jung. La Alta Kanto de la Amo. Poemo	0.30	
Jung. Landoj de l' Fantazio. Romano	1.50	
Jung/Wingen. Das leichte Esperanto. Lehrbuch für Anfänger	0.60	
Schlüssel dazu	0.30	
Jung/Wingen. 12 Abende Fortbildung in der Weltverkehrssprache Esperanto. Lehr- und Übungsbuch für Fortgeschrittene	0.75	
Schlüssel dazu	0.30	
Kilian. La mondon al ni!	0.60	
Kitzler. Internacia gramatiko de Esperanto	1.20	
Kloepffer (Goppel). Vagabondo kaj sinjorino. Romano	1.50	2.40

	broŝ.	bind.
La Maro. Rakontoj		1.50
La Multekolora Libro. 128 p. kun tre varia enhavo	0.75	
La senkorpa mistero	0.15	
Maxwell (Sampson). Anstataŭa edzino. Romano	1.50	2.40
Meye. La longa vojo. Originala romano	1.20	
Mozaiko. Varia legaĵo	0.15	
Oriento. Orientaj literaturaĵoj		1.50
Osmond. Travivaĵoj de Kiki. Originala legaĵo por la junularo. Volumetoj I kaj II, ĉiu kostas	0.15	
Robinson. Se grenereto. Rakontoj	0.75	1.20
Scherer. Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo	2.25	
Scott. Filatela terminaro	0.30	
Storm (Heitmüller). Du majstro-noveloj: 1. La Blankĉevala Rajdanto; 2. Violo trikolora	0.90	1.50
Sub la signo de l' Espero. Rakontoj el la esperantista vivo. 62 paĝoj	0.15	
Tolstoj A. (Pill). Aelita, aŭ: <i>La Marso formortanta.</i> Romano	1.20	1.80
Tolstoj A. (Hohlov). La morto de Danton. Tragedio	0.30	
Trögel (Schröder). Esperanto kaj kulturo. (Individuo — popolo — homaro)	0.30	
Wiesenfeld. Galerio de Zamenhofoj. Kun 18 portretoj	0.30	
Wingen. Kiel aranĝi kursojn kaj grupvesperojn?	0.15	
Zweig (Wolff). La okuloj de la eterna frato	0.75	

Populara Esperanto-Biblioteko

(Bonaj libroj, bele eldonitaj kaj tolbinditaj.
Prezo de ĉiu volumo 1.95.)

1. Ivans (Versteeg). **La viro el Francujo.** Kriminalromano.
2. Sienkiewicz (Lidja Zamenhof). **Quo vadis?** Vol. I.
3. La sama. Vol. II. (Ni liveras nur ambaŭ volumojn kune.)
4. Haggard (Degenkamp). **Si.** Romano.
5. Ferber (Fabo). **Fanny.** Romano.
6. Oppenheim (Wadham). **Riĉa kaj sen mono.** Romano.
7. Oppenheim (Romford). **La ora ŝtuparo.** Romano.
8. Haggard (Payson/Butler). **Luno de Izrael.** Romano.
9. Collodi (Marchesi). **Pinokjo.** Historio de marioneto.
10. Wells (Milward). **La dormanto vekigas.** Romano.
11. Sinclair (Bailey). **Petrolo.** Vol. I.
12. La sama. Vol. II. (Ni liveras nur ambaŭ volumojn kune.)
13. Norway (Severn). **La aventuroj de Marteno Drake.** Romano.
14. Chesterton (Bean). **La naiveco de Pastro Brown.** Detektivaj rakontoj.

Muusses Esperanto-Biblioteko

(Prezo de unuopa n-ro 0.35; kompleta serio de 10 n-roj 2.50)

1. Glück. **La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo.**
2. Lermontov kaj Mamin-Sibirjak (Filatov). **Rusaj noveloj.**
3. Jung. **De Muheddin ĝis Mundilatin.** Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj.
4. Scherer. **Tra Usono kun ruliĝanta hejmo.**
5. Glück. **El la klasika periodo de Esperanto.** (Grabowski kaj Kabe.)
6. Zamenhof. **La kongresaj paroladoj.** Unua parto.
7. Zamenhof. **La kongresaj paroladoj.** Dua parto.
8. Petöfi (Spierer). **La avo.**
9. de Bengoa (Berenguer). **La ĵusnaskito.** Nekredebla historio.
10. Glück. **La Jubilea Kongreso de Esperanto 1912.**

Petu la detalan Librokatalogon de Heroldo ! Mendu ĉi-supre indikitajn librojn ĉe :

HEROLDO DE ESPERANTO, Harstenhoekweg, 223, SCHEVENINGEN, Nederlando

aŭ ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO, HERONSGATE, RICKMANSWORTH (Herts.), Anglujo